

Esperanto

aktuell 2018/1



- La kuiristoj dum LUMINESK' – La silvestra renkontiĝo de GEA
- Jarfinaj bonсурprizoj en Esperantujo
- La 30-a datreveno de la Ratkaptista Bando en Hameleno
- Kanto en Esperanto: "Gardi la revon"
- Haushaltsplan 2018 der DEJ
- Protokoll zur Jahreshauptversammlung der Deutschen Esperanto- Jugend (DEJ)
- Esperanto-Librotago en Vieno

Deutscher Esperanto-Bund e.V.

Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B

www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

gea.eo.tel (Kontaktdaten)

Bankkonto (por membrokotoj kaj donacoj) /

Bankverbindung (für Mitgliedsbeiträge

und Spenden): HELADEFIERB,

Sparkasse Odenwaldkreis,

DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den

D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle:

Esperanto-Laden

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: **Sibylle Bauer**

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

sibylle.bauer@esperanto.de

Membropriorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 - 3 36 36 36 – 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 – 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere

Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie

wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die

angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern**

sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu

wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / retmesaĝo al gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar

per E-Post-Adresse in der Form

vorname.name@esperanto.de.

Siehe auch estraro.gea.eo.tel

Prezidanto / Vorsitzender

Ulrich Brandenburg, Durchwahl: -5111

gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

D-ro Matthias Hecking, Durchwahl: -5113

Landaj ligoj / Landesverbände

Wolfgang Bohr, Durchwahl: -5114

Administrado / Verwaltung

Barbara Brandenburg

Publika agado kaj pliklerigado /

Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung

Oliver Walz, Durchwahl: -5116

Retpaĝo, dissendolistoj / Internetauftritt,

Mailinglisten

Julia Noe, Durchwahl: -5117

Jugendvertreterin / GEJ-komisiito

Cornelia Luszczek, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5121

gej.prezidanto@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Siehe auch gea.eo.tel

Gazetara parolisto / Pressesprecher

D-ro/Dr. Rainer Kurz, Plettenbergstr. 19,

70186 Stuttgart, 0163-3873785,

rainer.kurz@esperanto.de

Verantwortlicher für Öffentlichkeitsarbeit

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

Medienecho

Hermann Kroppenber, Durchwahl: -5121

medienecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand

Printempa Semajno Internacia (PSI) /

Internationale Frühlingswoche

Petra Dückershoff, Durchwahl: -62

psi@esperanto.de, www.esperanto.de/psi

Rondvojaĝoj / Rundreisen

Lars Sözüer, Durchwahl: -5123

rundreisen@esperanto.de

www.esperanto.de/rundreisen

Kontaktadresoj / Kontaktadressen

Julia Noe, Bergiselstraße 3, 79111 Freiburg

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

gej.eo.tel (Kontaktdaten)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), martin.haase@esperanto.de,

www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

bibliothek@esperanto-aalen.de; www.esperantobibliothek.de

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG,

BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aej@esperanto.at, www.esperanto.at

Aŭstria Esperanto-Junularo /

Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

aej@esperanto.at, <http://aej.esperanto.at>

Esperantomuzeo Vieno /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische

Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-

beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen siehe

mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Postel. +43/66473611289,

aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuell

ISSN 0942-024 X, 33. Jahrgang

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),

Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23, 42119

Wuppertal. Durchwahl: -541

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Uwe Stecher (Österreich, El la mondo),

Hermann Kroppenber (Medienecho),

Utho Maier (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

Presejo / Druck

Alfaprint, Martin, Slovakio

Esperanto aktuell kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 18 €

(de eksterlando: 24 €) jare.

Esperanto aktuell mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €

(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc a.s.)

al ea@esperanto.de, por n-ro 2018/2 ĝis la 15-a

de marto 2018. Paperaj kontribuoj nur esceptkaze,

tiam al Yashovardhan Singh (vidu supre). Senden

Sie Ihre Beiträge bitte (im Format *.doc o.ä.) an

ea@esperanto.de, für Nr. 2018/2 bis zum 15. Mär

2018. Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan (s.o.).

Esperanto aktuell aperas ankaŭ por blinduloj, danke al Uwe Stecher el Aŭstrio: en DOC-formato, kun priskribo de la fotoj.

Interesiĝantoj skribu al punktor@live.at

Karaj legantoj,

la jarfinajn tagojn multaj el ni tradicie pasigas en esperantista medio. Estas la sezono de Esperanto-renkontiĝoj, almenaŭ en meza Eŭropo. La komencon jam en la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento faris Germana Esperanto-Junularo kun la Internacia Seminario (IS). Ĝi lastatempe transformiĝis al JES (Junulara Esperanto-Semajno), kiu siavice la 9-an fojon estis organizata en kunlaboro kun Pola Esperanto-Junularo. Ankaŭ dum pluraj jardekoj Hans-Dieter Platz paralele organizis la Internacian Festivalon (IF) por eksjunuloj kiel mi. La lasta IF okazis en 2014/15. Por tamen daŭrigi la tradicion Germana Esperanto-Asocio decidis mem organizi jarfinan renkontiĝon por la sama celgrupo: Luminesk', kiu nun okazis la 3-an fojon sub gvido de Andreas Diemel. Kaj jam la 16-an resp. la 9-an fojon "Esperantoland" (Lu von Wunsch-Rolshoven) organizis la Novjaran Renkontiĝon / Novjaran Internacian Semajnon (NR/NIS). Por ŝpari kostojn la renkontiĝoj okazas en junulargastejoj aŭ domoj kun simila komforto. Ĉiu scias, ke oni ne atendu tro da lukso, sed estos kompensata per bona etoso en rondo de Esperanto-geamikoj. Mi mem en la lastaj jardekoj nur malofte maltrafis tiun okazon, kvankam mi dum la jaro apenaŭ havis tempon kaj okazon por esperantumi.

Ĉi-foje mi dividis min inter la NR en Saarbrücken kaj la Luminesk' en Haltern: la unua kun pli ol 190, la dua kun 40-50 partoprenantoj. En Saarbrücken la domo estis bone konata (jam multaj E-aranĝoj okazis tie) kaj dum unu semajno plene okupita de Esperanto-parolantoj. 60 el ili aĝis 18 aŭ malpli. Ĉu realeco aŭ nur impresoj: la nombro de Esperanto-familioj ŝajnas kreski. Ĝojigis denove renkonti multajn infanojn, kiuj plej nature ludas kune en nia lingvo. La programo enhavis la jam kutiman miksaĵon de kursoj, prelegoj aŭ diskutgrupoj kaj distraj programeroj. Unu kulmino certe estis la koncerto de la "Kajto"-kvaropo la 29-an vespere. Al la vespera programo jam tradicie apartenis "gufujo" – malfacile tradukebla termino por kunveno kun teo, trankvilo kaj edifaj diskutoj. En Haltern la domo (katolika klerigejo) estis iom pli komforta, sed ne ekskluzive je dispono de la Luminesk'-anoj – plurajn tial necesis loĝigi en hotelo. Ankaŭ en Haltern oni "gufis", sub gvido de Dieter kaj Yoshie Kleemann.



Nova programero estis kuir-konkurso kun la elekto de majstra kuiristino: venkis Liu Jun el Ĉinio. Partoprenis multaj el la iamaj IF-anoj. Kun pli frua informado kaj malpli limigitaj tranokteblecoj en la domo oni verŝajne povintus altigi la nombron al 60-70.

Se oni adicias la partoprenantaron de tiuj du renkontiĝoj kun la samtempa JES en Szczecin, la tuta nombro proksimas al 500 – ne malbona evoluo kaj pruvo, ke Esperanto vivas kaj viglas. Mi mem ofte uzas tiun argumenton en diskutoj pri la asertita malsukceso de la internacia lingvo. Ĉiuj tri renkontiĝoj evidente ankaŭ donis okazon informi la lokajn gazetojn, kiuj publikigis artikolojn kaj intervjuojn. La sarlanda radio krome elsendis belan intervjuon kun Lu kiel NR-organizanto. Dankon al li kaj la NR-teamo pro la multa laboro investita en tiun renkontiĝon, kiu akiris firman lokon en la kalendaroj de multaj el ni. Kaj dankon al Andreas kaj liaj kunbatalantoj pro la sukcesa Luminesk'. Ambaŭ renkontiĝoj same kiel la JES – nun denove en Germanio – refoje atendas nin post unu jaro. Jes: la organizado de renkontiĝoj streĉas niajn fortojn. Kaj parto de la esperantista medio trovis novajn forumojn en la reto. Sed lingvon necesas paroli almenaŭ de tempo al tempo. Tial renkontiĝoj (en la GEA-programo ĉi-jare sekvos la paska PSI en Plauen kaj la pentekosta kongreso en Zweibrücken) restos prioritataj por ni. Kaj ankaŭ por tio – eĉ se la esperantistaro transformiĝas kaj neniu estas devigata ie membriĝi – ni ankaŭ estonte bezonos organizitan kaj ageman movadon.

Amikajn salutojn

Ulrich Brandenburg
Prezidanto de GEA

Enhavtabelo/Inhalt

1: La kuiristoj dum LUMINESK'
– La silvestra renkontiĝo de GEA

2: Adresoj

3: Germana Esperanto-Asocio:
Karaj legantoj! Enhavtabelo.

4-6: Interkultura Centro Herzberg:
Jarfinaj bonsurprizoj en Esperantujo.
Tutjaraj Zamenhofaj travivaĵoj en la
Esperanto-urbo Herzberg. Esperanto-
Termine in Herzberg am Harz... die
Esperanto-Stadt (seit 20. Dez.).
SEP3 – Somera Esperanto-Perfektigo

7-9: El bibliotekoj kaj arkivoj:
Folge 36 – "Kein Bier für Idioten"

10-13: El landaj ligoj: Esperanto por
komercaj retejoj. La 30-a datreveno
de la Ratkaptista Bando en Hameleno.
Esperanto-Buchversand bei Mainzer
Büchermesse. Belegaj tagoj en Svitavy

14: Kanto en Esperanto: "Gardi la
revon"

15-18: El la mondo

19-21: Medienecho

22-25: **kune** – revueto de
Germana Esperanto-Junularo:
Haushaltsplan 2018 der DEJ. Protokoll
zur Jahreshauptversammlung der
Deutschen Esperanto- Jugend (DEJ)
e.V. Partoprenu IJF-on en Italio
senpage! Der Vorstand: KEKSO in
Zweibrücken vom 18.-21.Mai. Skolta
tendumado en Herzberg dum Pasko.
Zelten mit den Pfadfindern zu Ostern
in Herzberg. Neuer Newsletter für
euch!

26: Aŭstria Esperanto-Federacio:
Esperanto-Librotago en Vieno. La
Zamenhofa Festo. Information zum
Artikel "Esperanto-Geld" der Ausgabe
6/2017

27: Kalendaro

28-29: Germana Esperanto-
Asocio: Busausflug ins romantische
Blieskastel. Ausflug in die
Nachbarstadt Pirmasens am Samstag.
Busausflug nach Bitche (FR) am
Montag. Warum spenden oder
vererben?

32: Fotoj el la jarfinaj renkontiĝoj

20.12.2017: inaŭguro de la nova ekspozicio "Demokratio sen limoj" en la muzeo de la bela Welf-kastelo Herzberg

Jarfinaj bonsurprizoj en Esperantujo

Jen aktuala surprizo: Okaze de la malfermo de la inaŭguro de la nova ekspozicio "Demokratio sen limoj" (Demokratie ohne Grenzen) en nia kastela muzeo aperis sinjoro Lutz Peters (urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg) kaj sinjoro Ulrich Schramke (vicurbestro de la Esperanto-urbo Herzberg am Harz).

Ili ambaŭ estis profunde impresitaj pri la novaj ekspozici-materialoj de la Esperanto-Centro kaj gratulis kaj dankis pro la multflankaj aktivecoj kaj sukcesoj.

Peter Zilvar klarigis la tekstojn, montris la 8 diversajn temokampojn kun raraj historiaj materialoj. I.a. Peter Zilvar dokumentis kaj emfazis la tiel nomatan "mondpasporton" kaj mondevivitecon laŭ la fama pacbatalanto Garry Davis. Li ja tre ŝatis nian neŭtralan lingvon. Multajn historiajn bildmaterialojn ni prezentis pri la iama landeto "Amikejo"

(Moresneto) en la trilanda angulo (Belgio, Germanio, Nederlando), kiu funkciis ĝis la jaro 1918.

Surbaze de la historiaj kaj ellaboritaj tekstoj, ekz. pri limoj, gardistoj, doganejoj, pasportoj, personaj pruviloj ktp. Zsófia Kóródy ellaboras por vi dulingvan memorlibreton pri vere aktuala ekspoziciotemo.

Bonvolu viziti la jam 14-an fakekspozicion en la kastela muzeo de Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. La lasta ekspozicio (ĝi servis ĝis la lasta semajnofino tie) temis (pro la Zamenhof-jaro 2017) kompreneble pri la aŭtoro de la lingvo Esperanto.

Cetere ĉiun unuopan fakekspozicion rigardas averaĝe ĉ. 6000 homoj (eĉ el multaj regionoj kaj landoj).

Sur la foto de Petro Zilvar videblas: Tute dekstre la sinjorino Kastrati de Landkreis (subdistrikta administracio) Göttingen, apud ŝi la urbestro, sinjoro Lutz Peters, en la mezo la vicurbestro Ulrich Schramke kun la edzino. Maldekstre staras tri reprezentantoj de la Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg).



Tutjaraj Zamenhofaj travivaĵoj en la Esperanto-urbo Herzberg

Nu, ja, la unika Zamenhof-jaro 2017 (laŭ Unesko) kaŭzis diversajn sukcesajn publikajn agadojn. Kelkajn ni volas menciigi speciale por la legantoj de *Esperanto aktuell*.

Jam antaŭ pli ol unu jaro ni parolis kun la urbaj oficistoj, politikistoj ktp. ekzemple rilate al ebla nomdonado de la parkplaco, kie staras la bela Zamenhof-monumento en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, ke ĝi ricevu la nomon "Zamenhof-placo". Laŭ germanaj leĝoj almenaŭ tri diversaj politikaj instancoj (komitatoj) devas por tio favore voĉdoni. Kaj ni sukcesis: en decembro 2016 la lasta instanco, nome nia urba konsilantaro, konsentis.

En marto 2017 ni komencis grandan tutlandan gazetan kampanjon rilate al la Zamenhof-jaro, nomdonado de la urbocentra placo "Zamenhof-placo". Krome ni informis retportalojn, radio- kaj televidkanalojn. Meze de aprilo 2017 en preskaŭ ĉiuj germanaj gazetoj aperis artikoloj pri tio, ofte kun foto de la Zamenhof-monumento ktp. Ni informis la ŝtatajn gazetarajn agentejojn (Deutsche Presseagentur / DPA). Ili zorgis pri kromaj kutpaĝaj artikoloj, kelkfoje kun bildoj pri dulingaj vojmontriloj, indikiloj, kun nia urbestro Lutz Peters, gelernantoj.

Eĉ en kelkaj aliaj landoj aperis pri tio artikoloj, ekzemple en multaj grandaj gazetoj de Meksikio, ĉe la internacia



radiostacio Deutsche Welle en Moskvo, en grava fakgazeto en Budapeŝto, en la anglalingva magazino "Gulf Times".

En aprilo ni havis belan "Zamenhof-placan" inaŭguran feston, ekzemple kun nia dua urbestro, la Esperanto-koruso el Halle/Saale, granda delegacio kun artstudentoj de la universitato Poznano.

Krome en la kastela muzeo ni ofertis specialan Zamenhof-ekspozicion kun multaj dokumentoj kaj raraĵoj ĝis mezo de decembro 2017. I.a. ni varbis per grandformataj afiŝoj. Certe pli ol 6000 homoj rigardis ilin. Ofte regionaj gazetoj raportis pri tio.

Artstudentoj el Poznano kreis oran kaligrafiaĵon sur kolono en la hotelo "Zum Pass" en Herzberg-Siebert. La esperantlingvaj posedantinoj Barbara Khan kaj Teresa Liberski ja devenas el Poznano.

En decembro 2017 ni festis nian tradician Zamenhof-feston en la hotelo "Zum Pass". Ankaŭ aperis nova juna ĉina esperantisto. Sankta Ruperto disdonis el granda sako multajn donacojn.

Ni bone manĝis ĉe komuna bufedo, kantis tradiciajn kristnaskajn kantojn, ĉefe en Esperanto, sed ankaŭ en la germana. Pianisto Richard Koscielnny zorgis pri bonkvalita muziko.

En decembro 2017 okazis inaŭguro de nova art-ekspozicio en la kastela muzeo. Talenta pentristo Siegfried Schubert kreis elstaran Zamenhof-pentraĵon.

Kelkaj gravaj homoj el nia urbo rekomendis tujan akiron. Dank' al eksterlanda sponsoro ni havis la bonŝancon, certe Zamenhof (la pentraĵo) estonte bone varbos por Esperanto.

Sur la fotoj: La Zamenhof-festo en la hotelo Zum Pass en Herzberg-Siebert.



Esperanto-Termine in Herzberg am Harz... die Esperanto-Stadt (Seit 20. Dez.)

Mittwochs ab 16:30 h Esperanto-Klub mit der LEB (Kursus, Unterhaltung, Informationen, Gäste), ICH

Ab 20. Dez. 2017 Neue Sonderausstellung "Demokratie ohne Grenzen" im Museum des Welfenschlosses Herzberg (Mi – So 11h – 16h)

14.2.18 19:30 h Interkultureller Abend über Minderheiten u. Kulturen in Europa

16.02.18 – 18.02.18 Esperanto-Wochenendkurse im ICH, Herzberg

23.02.18 – 25.02.18 81a GEA-Klerigseminario kun interesa ekskurso

05.03.18 – 09.03.18 Bildungsurlaub "Esperanto" per VHS Göttingen-Osterode im Esperanto-Centro mit Verlängerungsmöglichkeit des Kurses im Esperanto-Centro

11.03.18 (So) 10:30 h Sitzungen der Esperanto-Stiftung Stadt Herzberg

14:00 h Orga-Sitzung im Esperanto-Centro Herzberg (für geladene Gäste)

14.03.18 19:30 h Interkultureller Abend (über Ungarn)

16.05.18 19:30 h Interkultureller Abend (über Polen)

18.05. – 21.05.18 (Pfingsten) Deutscher Esperanto-Kongress in Zweibrücken, Mitfahrgelegenheiten

13.06.18 19:30 h Interkultureller Abend: Über die Geschichte der Sprachen

28.06.18 – 01.07.18 82a GEA-Klerigseminario kun interesa ekskurso

02.07.18 – 08.07.18 Internaciaj Esperanto-Kursoj (SEP - Somera Esperanto-Perfektigo)

08.07.18 – 15.07.18 Internaciaj Esperanto-Kursoj (SEP), ankaŭ por tendumantoj & Verdaj Skoltoj

12.07.18 Naskiĝtaga festo "12-jara Esperanto-urbo Herzberg"

14.07.18 – 21.07.18 13-a Somera Arbara Lernejo (kun gelernantoj el Herzberg & Górá) en Górá/PL

28.09.18 – 03.10.18 TORPEDO 13 (Pedagogiaj Tagoj en Herzberg) AGEI & GEA

09.11.18 – 11.11.18 Esperanto-Wochenendkurse

14.12.18 – 16.12.18 GEA-Klerigseminario kun Zamenhof-festo

Anmeldung / Aliĝilo



Ich nehme von: bis:
Mi partoprenos de: ĝis:

am folgenden Kurs teil:
la sekvajn kurson:

☐ Ich komme mit der Bahn. Mi venos per trajno.

☐ Ich komme mit dem Auto. Mi venos per aŭto.

Ich habe folgende Bemerkungen:
Mi havas sekvajn rimarkojn:



Ich möchte übernachten im:

Mi ŝatus tranokti ĉe:

Mi ĝiras antaŭpagon de 50,00 € al:

Ich überweise eine Vorauszahlung in Höhe von 50,00 €

an die Esperanto-Gesellschaft Südharz in DE-37412 Herzberg am Harz
Sparkasse Osterode, IBAN: DE28263510150101457927 BIC: NOLADE21HZB

Name / Nomo:

Anschrift / Adreso:

Netzanschrift / Retadreso:

Telefonnummer / Telefonnumero:

Datum / Dato:

Unterschrift / Subskribo:



Deutscher Esperanto-Bund – Filiale für Weiterbildung & Kultur
Germana Esperanto-Asocio – Filio por Klerigado & Kulturo
Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo, Germanio
Tel. 05521-5983 E-mail: esperanto-zentrum@web.de www.esperanto-urbo.de

SEP3 – Somera Esperanto-Perfektigo

Speciala somera oferto



01-08.07.2018
+
09-15.07.2018



- Esperanto-lingvokursoj / Sprachkurse
 - Starter Komencantoj
 - Fortgeschrittene/r Progresintoj
- 2x1-semajna instrukapabla klerigmodulo por instruemuloj

Programme / Programoj

Täglich: 6 Unterrichtsstunden (von Montag bis Samstag)
Ĉiutage: 6 instruhoroj (de lundo ĝis sabato)

- Nachmittags: Besichtigungen, Führungen, Wanderungen
Schwimmen, Radfahren, Ausflüge. Workshop: trommeln
- Posttagmeze: Vizitoj, ekskursoj, naĝado, biciklado, promenado, festoj, tamtado, ktp.
- Abends: Filme, Musik, Spiele, Unterhaltung, Grillfest
- Vespere: Filmoj, muziko, ludoj, babilado, literaturo, ekskursoj, rostadfestoj

Kosten / Kosto

Kursgebühren: 1 Woche 120,00 € 14 Tage = 185,00 €
Kurskotizoj: 1 semajno 120,00 € 14 tagoj = 185,00 €

Ermäßigte Preise z.B. für Schüler und Studenten. Es sind einige Stipendien möglich.
Rabatitaj prezoj: ekz. por gestudentoj! Eblas kelkaj stipendioj, bv. demandi!

Übernachtungsmöglichkeiten / Tranoktebloj

Wir vermitteln für Sie! / Ni peras por vi!

1) Preiswerte Übernachtung / favorpreza Esperanto-tranoktejo	15,00 €
2) Hotel (2-4 Sterne, mit Frühstück) / hotelo (2-4-stela, kun matenmanĝo)	35-60 €
3) Privates Apartement (bei mind. 2 Personen)	ca. 20 € Person/täglich
Privata apartamento (se min. 2 personoj)	ĉ. 20 € persono/tago
4) Im eigenen Zelt / en propra tendo:	kostenlos / senkosta



Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 36 – “Kein Bier für Idioten”



Bestimmt fragt sich der Leser: “warum denn diese Überschrift?” –das klärt sich hoffentlich zu Ende meines Beitrags – dann wurde dieser Text wenigstens gelesen und vielleicht auch verstanden

– und hat auch Zustimmung erfahren, hoffe ich.

Schon vor sehr langer Zeit konnte man, in *Esperanto aktuell* 32(2013) Heft 3, die Folge 13 lesen. Man wird sich wohl nicht mehr daran erinnern. Ich dagegen weiß noch genau, wie emotional das ganze Thema war, ging es doch um den 80. Jahrestag der Bücherverbrennungen durch das NS-Regime. Und bald schon wird es 85 Jahre sein, dass in Deutschland unliebsame Bücher den Flammen anheim gegeben wurden. Dabei ist das gar nicht so selten, wie ich damals schon schrieb. Die Liste weiterer Vorfälle wuchs inzwischen weiter.

Immer schon waren die Herrschenden aber auch andere Menschen, darauf aus, unliebsame Veröffentlichungen zu unterbinden, nicht nur aber auch durch Verbrennen. Meist war es völlig nutzlos, einen kritischen Text oder nicht gewünschte Ideen zu eliminieren; waren doch zumeist noch Abschriften davon vorhanden. Ein sehr illustratives Beispiel stammt aus der Antike, also lange vor Erfindung des Buchdrucks; Details dazu beschreibt die Netzausgabe dieses Textes (kurzelinks.de/kurzuro).

Genauso wenig, wie es römischen Kaisern gelungen war, missliebige Gedanken auszurotten, hatte dann die römische Kurie (genauer: die Congregatio Romanae et universalis Inquisitionis, später Sacra Congregatio Sancti Officii) nur magere Erfolge mit ihrem Jahrhunderte lang gepflegten und veröffentlichen *Index Librorum Prohibitorum* = “Verzeichnis verbotener Bücher”, welches erst 1966, also nach dem 2. Vatikanischen Konzil abgeschafft wurde (ungewöhnlich für die katholische Kirche war: es wurden sogar die Strafen aufgehoben, die auf Grund dieser Verbote eingetreten waren!).

Als Kuriosum kann man da auch Ovid erwähnen. Der soll wegen seiner erotisch freizügigen Liebeslegien und des Ratgebers “Ars amatoria” über die Liebeskunst durch den sittenstrengen Kaiser Augustus ans Schwarze Meer verbannt worden sein, allerdings erst 8 Jahre nach dem Erscheinen dieses anstößigen Werks. Sein Hauptwerk Metamorphosen war aber noch nicht erschienen, und Ovid verbrannte dessen Manuskript kurzerhand selbst, wohl aus Verzweiflung. Und doch gab es auch davon bereits Abschriften, so dass es der Nachwelt dennoch überliefert werden konnte.

Nicht nur auf die Kirche müsste man zeigen; und nicht nur Inquisitoren, Tyrannen, religiöse oder nationalistische Fanatiker sind eifrig beim Bücherverbrennen, sondern vor allem zeigen sich da eifrig die (zuweilen selbsternannten) Pädagogen.

Es ist immer leicht, mit ausgestrecktem Zeigefinger auf andere zu weisen. Doch selbst wenn es sich dabei um echt verabscheuenswürdige (auch um ehemalige) Zeitgenossen handelt, weisen nach allgemeinem Wissen immer noch mindestens 3 Finger auf einen selber zurück.

Statt etwa die Parole *Keine Nazis in den Deutschen Bundestag!* auszugeben, sollten wir uns alle (statt gewählte Volksvertreter herabzusetzen) fragen, was wir wohl falsch gemacht haben, dass so viele andere Wähler sich nicht mehr mit und in den bestehenden Parteien wohl gefühlt haben. Haben wir den Boden mit-bereitet, auf dem da jetzt diese Saat aufging? Ich habe da auch keine passende Antwort parat, aber mahne zum Nachdenken.

Und hier fragt sich der Leser vielleicht, wie man von dieser Thematik die Kurve kriegen kann, hin zu einem “echten” Esperanto-Thema.

Leider ist gerade das kein großes Problem!

So mancher hat sich vielleicht bei Gesprächen über Esperanto und dessen Verbreitung schon mal zu Aussagen wie dieser hinreißen lassen: *In und bei Esperanto gibt es nichts, was es nicht sonst auch gibt!* Da mag wohl schon etwas dran sein. In einer französischen Diskussionsrunde bei lernu.net gab es vor Jahren schon (genauer: 2011) die besorgte Frage, ob es denn unter den Esperantisten auch Nazis gäbe. Gewiss, es mutet seltsam an, da Zamenhof ja jüdischer Abstammung war.

Man muss es viel allgemeiner sehen: Fanatiker gibt es zu jedem beliebigen Thema und überall, also auch in der Esperantowelt. Und Fanatismus ist leider nur selten etwas Gutes. Wenn es jedoch geschmacklos wird, dann sollte man sich deutlich davon distanzieren, egal um welche Richtung von Fanatismus es geht. Hier soll es um Ido gehen.

Die Plansprache *Ido* ist **nicht** der Feind des *Esperanto*, sondern wie schon ihr Name sagt: ein Abkömmling. Einen solchen muss man nicht bekämpfen, und schon gar nicht ausrotten. Möchte man Ido-Anhänger “bekehren”, dann sollte man überzeugendere, schlagkräftigere Argumente vorbringen; denn nicht “das Bessere ist des Guten Feind” – das bessere Argument ist angesagt! Schade finde ich die viele Energie und Zeit, die Idisten der Pflege ihrer Sprache widmen.

Ich weiß, wovon ich schreibe; denn wenn man auch das Ido in den Plansprachen-Sammelauftrag der Bibliothek miteinbezieht, muss man auch regelmäßig die Aktivitäten auf diesem Sektor verfolgen.

Bevor ich den Blick werfe auf Anti-Ido-Fanatismus, soll hier ein Zitat aus einem Jura-Forum (2005) stehen:

“Als Akademiker möchte ich anmerken, dass dies das schlimmste für mich Vorstellbare ist, was man mit gedrucktem und gebundenem Wissen machen kann. Wieso sollte man Bücher verbrennen? Auch wenn man nicht die Aussagen oder

Meinungen anderer teilt, so haben diese Aussagen doch das Recht zu bestehen. Das Verbrennen von Büchern ist ein Akt der Barbarei und unangemessen in jeder Hinsicht – besonders vor dem historischen Hintergrund unseres Landes. Verachtender kann man pure Dummheit nicht zum Ausdruck bringen.”

Kurz und knapp: wieso müssen denn solche Fanatiker ihre pure Dummheit derart in der Öffentlichkeit breittreten, sozusagen als geistiges Armutszeugnis?


Was ist also von diesem Szenario zu halten: **Dass ein Esperantist in ritueller Weise einen Idisten verbrennt?** Gibt's nicht? – Sollte es nicht geben!

Für mich war das undenkbar, und doch konnte man gerade das auf Youtube finden: (ich verzichte bewusst darauf, hier die Quelle zu nennen – das muss nicht weiter verbreitet werden). Die Verbildlichung ist hier nicht das Schlimme, meine ich; was in diesem Zusammenhang alles an Text verfasst wurde, geht wirklich auf keine Kuhhaut.



Esperantisten [derart] über Ido herfallen, will ich öfter Ido nutzen ... Was für dummes Zeug! ... so kindisches Tun ... Nach mehr als 100 Jahren, wieso dieser Groll?”

Abscheulich, ja geradezu pervers ist auch, dass Esperantisten das Video [um cool zu wirken = mojosé?] kommentieren mit “Bruligu lin!!!”. Aber wenn sich nach 3 Minuten der angebliche Esperantist doch noch als sehr Nazi-affin outet, dann wird es endgültig geschmacklos, (zumindest sehe ich das so).



War wohl Zufall, dass das Magdeburga folio am 2.1.2018 über einen Blogbeitrag von Solis (Liu Xiaozhe) berichtete, der sich mit einer ganz ähnlichen Thematik befasste. Solis kam zu folgendem Schluss: “Subtenantoj de Esperanto kaj de aliaj artefaritaj lingvoj estas ne malamikoj, sed samideanoj. Ni kune klopodu por la bela ideo de egalaj homaj lingvaj rajtoj!”

Zurück zum Text in der Überschrift! Sie ist Zitat aus einer Karikatur, die mir jüngst auffiel und sofort gefiel. Um Problemen mit dem Urheberrecht aus dem Weg zu gehen, werde ich hier die Karikatur von Martin Perscheid nur mit Worten zitieren (mir kommt es mehr auf den Inhalt an als auf dessen bildliche Darstellung): Die typische Perscheid-Figur steht vor ‘ner Kneipe und betrachtet ein Infoschild mit der Aufschrift “kein Bier für Idioten” und denkt dann für sich “na toll – da wird man als Nazi mal wieder total ausgegrenzt!”. Ich jedenfalls könnte mir weitere solche Gruppen vorstellen, denen ich Ausgrenzung wünschte, werde mich aber lieber zurückhalten, um nicht ebenfalls in Gefahr zu sein, auch als fanatisch zu gelten.

“Von Idioten umzingelt” wie ein beliebter Teenager-Comic (Gregs Tagebuch) titelt oder doch selber einfach nur dumm? Gerade musste ich mir die Frage stellen, ob ich nun selber schon zu diesem Kreis “kein Bier für Idioten” zu zählen sei. Roland Schnell hatte ja am 6.1. in der Netzliste esper-german mit vollmundigen Aussagen über das Wieder-Erstehen von Heroldo de Esperanto berichtet.

Da ich das nicht alles unwidersprochen stehen lassen wollte (inzwischen ist das auch auf esperanto.berlin in Deutsch oder Esperanto zu finden), hatte ich erst mal versucht, selber zu recherchieren, jedoch keine sehr klaren Antworten gefunden.



Da vielleicht nicht jeder Leser so ohne Weiteres das Ido perfekt versteht, hier einiges davon auf Deutsch (mit parallelem Original-Text auf kurzelinks.de/cenzuro):

“Ich fand gerade auf YouTube, wie ein Esperantist in ritueller Form die Gestalt eines Idisten verbrennt ... ich habe Ido gelernt, um Frieden und Glück zu vermehren ... Wie verabscheuenswert! Idisten sind offenbar erwachsener und vernünftiger ... Wenn

Ich wollte das direkt in der Liste kommunizieren und nachfragen, ob jemand mehr dazu weiß. “Geht ja ganz einfach”, dachte ich, schrieb meine Erkenntnisse und Fragen zusammen und sendete. Eine Bestätigungsmeldung erhielt ich nicht, aber auch keine Fehlermeldung. Dennoch kam es mir dann komisch vor, dass ich als reguläres Listenmitglied keine Mail mit diesem Inhalt erhielt. Vielleicht braucht das einfach mehr Geduld? Einige Tage habe ich abgewartet, und nichts kam – außer Frustration, weil der gesendete Inhalt offenbar ins Nirwana gegangen war und mir selber auch nicht mehr vorliegt.

Und so will ich hier wenigstens in Kurzform mein Anliegen vorbringen; denn es ist ja durchaus erfreulich, wenn eine neue Zeitung oder Zeitschrift in Papierform (wieder) auf den Markt kommt. Das sollte schon einen genaueren Blick wert sein, zumal dauernd gejammert wird (zu Recht, wie ich meine), wenn die papierenen Ausgaben von Zeitschriften wegsterben.

Roland hatte ganz richtig berichtet, dass das großformatige Blatt “Heroldo de Esperanto” damit warb, die am öftesten erscheinende Esperanto-Publikation zu sein. In der Vergangenheitsform formuliert und auf die Papier-Ausgaben bezogen gilt das ja heute noch (im Netz kann man heutzutage ein tägliches Esperantoblatt lesen, auf das ich unten hinweisen werde).

Was ich aber nicht bestätigen kann, sind die Angaben über Verkauf und Rückkauf, den Besitzer (“an eine Einrichtung namens KCE (Kultura Centro Esperantista) in der Schweiz verkauft.”), und schon gar nicht dieses: “Heroldo de Esperanto soll von nun an als monatliches Informationsblatt von KCE fungieren. Es gibt kein Abonnement, sondern soll sich über freiwillige Spenden tragen.” So ein Vertriebsmodell wäre ja revolutionär neu, kann sich (zumindest in Esperantujo) aber nicht rechnen, wie uns schon der Balkana Verda Stelo zeigte, der 2015 neu auf den Markt kam, beim angezielten Leserkreis nicht auf das erwünschte und notwendige Echo stieß und so wegen mangelnder Abo-Einnahmen in 2016 mit seiner Nummer 7 das Erscheinen wieder einstellen musste.

Wenn jemand die Quelle für obige Behauptungen kennt oder findet, bitte ich um eine Rückmeldung. Meine Recherchen ergaben da ein etwas anderes Bild:

Man fragte Fabrício Valle im Juni 2016 explizit, ob die Bindung an Esperanta Civito nach dem Verkauf bestehen bleibe. Darauf antwortete er deutlich, Heroldo sei für keine Organisation, für keine spezifische Esperantogruppe offizielles Organ ... natürlich werde er unabhängig sein und keiner solle erwarten, dass man nicht über Esperanta Civito berichte oder Artikel von civitanoj unterdrücke.

Er wollte die Anzahl der Heroldo-Abonnenten im Laufe von

2017 versechsfachen, obwohl seinen Aussagen nach schon die Hälfte genügen müsste, um den Fortbestand (wohl eher: das Neuerscheinen) und auch Profit zu sichern. 2017 hätten monatlich 16 Seiten und ab 2018 halbmonatlich, wobei er auch davon träumte, schließlich 32 Seiten pro Woche erreichen zu können.

Kostenfreie Probenummern sind 93(2017)2268(01) und 93(2017)2269(02); damit erhält man vom Jahrgang 2017 wenigstens 24 gedruckte Seiten. Über Facebook angekündigt waren 6 Nummern, bis Jahresende erschien wohl erst die Nr. 4. Dass Abo-Zahlungen notwendig sind für ein Weiterbestehen, bezeugt auch die Netzseite seiner *reta versio*, die gerade im Aufbau ist: “Ni bezonas vian abonon por plu eldoni la novan Heroldon.”

Jedoch scheint längst noch nicht klar zu sein, wie die Rechtslage aussieht. Wer mag, der informiere sich über Facebook und in HeKo (www.esperantio.net)! Ich denke, da ist noch nicht das letzte Wort gesprochen – man wird ja sehen, was noch passiert.

Was hier ebenfalls eine Meldung wert sein sollte, das sind neue Zeitschriften im Netz, auch wenn sie nicht mehr auf Papier verfügbar sind, sondern “nur” elektronisch.

An erster Stelle möchte ich hinweisen auf Kresko. Zuerst jedoch die Vorgeschichte:

Tempo war seit 1980 das offizielle Organ der Kroata Esperanto-Ligo (KEL). November 2017 erschien mit der 37(2017)130nov seine letzte gedruckte Nummer (https://www.esperanto.hr/tempo_11_2017.pdf); denn das kroatische Kulturministerium finanziert die Druckausgabe nicht weiter, wohl aber die Audio-Ausgabe (auf CD), die zusammen mit der Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (KUNE) herausgegeben wird. Natürlich wird *Tempo* künftig auch als *retgazeto* erscheinen.

Die Zeitschrift *Zagreba Esperantisto* beendete ebenfalls ihr Erscheinen. Sie wurde herausgegeben von der Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), und mit dem Ableben von Radenko Milošević (1943-2016) verlor sie ihren Hauptförderer.

Und nun die gute Nachricht: so sieht sich die UZE mehr oder weniger gezwungen, ein neues *reta informilo* ins Leben zu rufen: *Kresko*, das ist Kroata ESperantista KOLEgaro, welches monatlich erscheinen soll, komplett als Open Source; d.h. jeder darf und soll sie weiter verteilen, nachdrucken, auswerten ... Die Zeitschrift wird redigiert von Josip Pleadin, bei dem man sie sicher auch bestellen kann: zagreba.esperantisto@gmail.com. Die erste Nummer 01(2017)01dec erschien bereits.

Seit 20.11.16 erscheint im Netz die Tageszeitung “*La Hodiaŭa Ĵurnalo*” (lahodiauajurnalo.wordpress.com), die uns tagesaktuelle Nachrichten aus den Massenmedien auf Esperanto bietet. Bis Ende 2017 sind das bereits stolze 3653 Seiten – Hut ab!

Utho Maier

Ni funebras / Traueranzeige

Nur nun mi eksciis, ke en 9.12.2017 mortis Heidi Meiners, la vidvino de nia FAME-fondinto Franz Alois Meiners.

La FAME-Fondaĵo dankeme kaj respektoplene konservos ŝian memoron:

*Kaj la flugilojn nun
etendis la animo mia
ŝvebanta tra trankvilaj landoj
kvazaŭ celanta sian hejmon*
(Eichendorff)



Esperanto por komercaj retejoj

Verŝajne vi scias, ke kelkaj grandaj plurlingvaj retejoj ofertas uzadon ankaŭ per Esperanto.

Ekzemploj estas serĉ-maŝinoj kiaj Guglo (*google.com*) aŭ DuckDuckGo (*duckduckgo.com*), sed ankaŭ la bild-datenbanko Vikimedia Komunejo (*commons.wikimedia.org*). Ĉi-lasta, interese, permesas lingvo-elekton nur al ensalutintoj; anonimaj uzantoj devas uzi la anglan.

Malpli grandaj firmaoj aŭ institucioj ofte limigas sin al unu aŭ du lingvoj, ofte la loka kaj la angla. Kelkaj tamen havas mallongan, fiksitan priskribon de la entrepreno en pluraj lingvoj. Ĉe tiuj mi trovis interesan kampon por la uzo de Esperanto: Kelkaj tiaj entreprenoj pretas aldoni al la gamo de siaj lingvoj Esperanton, se iu disponigas al ili Esperantan tradukon de la priskribo.

Sukcesajn spertojn pri tio mi havis pri du institucioj:

La germana asocio “Pro Bahn” (*pro-bahn.de*) estas ne-profitcela asocio, kiu defendas la interesojn de pasaĝeroj en la publika trafiko. Ĝi prezentis sin en sia germanlingva retejo en la lingvoj angla, franca, hispana kaj itala. De post kiam mi disponigis la Esperantan tradukon, ankaŭ la verdstela flago nun ornamas la startpaĝon.

La firmao “Pfänderbahn” (*pfaenderbahn.at*) estas komerca funkciiganto de turisma telfero en Aŭstrio. Kvankam ĝia retejo estas precipe angla kaj germana, ĝi informas en 25 (jes, dudek kvin) pliaj lingvoj, kies flagetoj troviĝas sube sur la startpaĝo. Kaj jes, la 25-a lingvo estas la Esperanta traduko de mi.

Ĉe Pfänderbahn la afero estis iom malfacila, ĉar ĝuste kiam mi proponis mian tradukon, oni planis restrukturadon de la retejo. Do ekzemple la stelo-flageto, kiun mi estis adaptinta al la stilo de la malnova retejo, ne plu taŭgis. Sed fin-fine ĉio aranĝiĝis.



Foto: la aŭtoro

Kion indas atenti, se vi mem volas fari similan proponon al iu komerca retejo? Unue, la ŝancoj estas bonaj, se jam ekzistas fiksj, ne ĉiumonate ŝanĝiĝantaj informoj en pluraj lingvoj; tiam ne nur estas bona bazo por la tradukado, sed la entrepreno ankaŭ ne havas grandajn teknikajn problemojn aldoni unu plian lingvon. Due, serioze okupiĝu pri la tradukenda teksto. Se, ideale, vi povas eĉ korekti tajperaron aŭ fari alian proponon por plibonigo, vi donas seriozan impreson. Ĝuste se jam estas versioj en pluraj lingvoj, okazas ke oni forgesas aktualigi iun el ili, kaj por trovi tion ofte eĉ ne necesas scii la lingvon, se la aktualigo koncernis ekzemple prezojn, datojn aŭ personajn nomojn. Atentigante pri tia malaktualaĵo vi pruvas, ke vi serioze okupiĝis pri la teksto.

Plej grave, se la entrepreno rifuzas vian proponon, restu ĝentila kaj danku pro la okupiĝo. Kaj ne forgesu: Eĉ guto malgranda, konstante frapante...

Renardo Fössmeier

La 30-a datreveno de la Ratkaptista Bando en Hameleno

Estante rakontistino de fabeloj, imagu inviton al la urbo mem el unu de viaj plej ŝataj rakontoj. Ĉu vi povus rezigni iri tien?

Kaj vi eĉ pli komprenus se vi scias, ke tie la invitantoj parolas mian plej ŝatan “fremdan” lingvon, Esperanton. Kompreneble ankaŭ pluraj el mia dua familio, mia Esperanta amikaro, aŭ loĝas tie aŭ ankaŭ venas. Ĉu al ilia rendevuo nur venas rakontistoj? Hahahaha! Tute ne!

El diversaj landoj kaj landpartoj venas aliaj esperantistoj al la ĉarma urbo, al la amikaro tie, ne nur por interkonatiĝi kun la rakonta flanko, tamen por kunesti en amika rondo, havi seriozajn kaj iom malpli seriozajn, eĉ verajn amuzajn agadojn kune. Do ekde kiam falis la invito en mian retskatolon, anoncante, ke venos eĉ miaj karaj amikoj muzikistoj el Frislando nur po unu jaro kaj iomete denove kune en la baza formo de antaŭ kiom da jaroj?, mi komencas esti forgesema pri tempoj ktp, hihhi. Kaj venos mia “EO-nepo” la energiplena, kortuŝa afabla juna Johnny M.

Mi tuj ĝojis, kaj ekis interkonsenti pri tranoktado kaj por trovi kunvojaĝantojn tien. – Kial? Ĉar ja estas tamen granda distanco por sole veturi, ĉu, kaj malpli kosta por la aero, kaj por la monujo, se pluraj uzas saman veturilon, ĉu?

Ĉar estis oficiale nur 1 ½ tagoj, ni diru semajnfino, ne estis tiom facile trovi iun. Amikoj, kiuj normale vere kunĝojus la etoson, havis aliajn devojn hejme. Imagu mian ĝojon, kiam mia bofratino, vera komencanto, anoncis, ke ŝi volus ankaŭ partopreni. Do ne iri per mia granda buseto, tamen per ŝia “normala” aŭto, ni do eĉ pli ŝpare iros.



Jonny M. Foto: Heinz Sprick

Loĝi ni povis ĉe miaj karaj amikoj Klaus kaj Waltraut, ambaŭ el la “Ratkaptista Bando” de Hameleno, loĝante iom pli for en la vilaĝo Bensen. Kompreneble estis ĝojiga respondo, ĉar mi ŝategas tiujn gastigemajn amikojn!

Kaj do la 24-an “ek al la voj!” Ni ne kunhavis mapon, ni ja estis modernaj vojaĝantoj, ĉu ne? Ni do saĝe sekvis la vojindikilon, ĝis... Ne eblis atingi Hamelenon pere de la normala vojo!

Bone, iamaniere ni tamen atingis la domon, kaj estis akceptitaj kiel koraj amikoj de koraj amikoj. Ĉu ekzistas iu alia fonto, el kiu oni povas ricevi tiom da amikeco ol Esperanto? Post kelkaj minutoj ni jam sidis antaŭ varme memfarita bongusta supo ĉe tablo plenmetita de multaj mangĉblaj aĵoj, nekredible! La filo kaj la plej aĝa nepo ankaŭ ĉeestis. Pli da homoj por komuniki! Ili tamen bedaŭrinde ne parolas Esperante. Ni sentis kaj konstatis, ke ni estis ege bonvenaj! Babilis, kiel nur veraj amikoj sentime interrilatas. Kaj preskaŭ tro malfrue enlitiĝis tute kontente, antaŭĝuante la venontan tagon.

Kaj fin-fine en la Sumpflume, konataj ridantaj vizaĝoj, kaj dorsoj, hihhihi. Granda knuffla rondo komenciĝis. Amikoj en la mondo, vi konas la senton knuffli alian amikon, ĉu ne? Mojose! Mi sentis min ŝvebante de unu al alia ĝuante tiom da plenkoraj amikeco.

Salono plenplena de esperantistoj, konataj, ne jam konataj, de ĉiuj aĝoj, aŭskultis la bonvenigan paroladon kaj historiajn datumojn, kiujn Heinz W. Sprick tute ĉarme flue ŝprucis tra la salono.

Tiam, kiam la ĝenerala kunsido de la membroj de la landa ligo de Malsupra Saksio ekis, ekis samtempe la unua grupo por gvidata rindi en la ĉarma, surprize bone prizorgita, historia urbo Hameleno. Nia loka gvidistino nur parolis germane, kaj imagu, kvankam mi proponis traduki por tiuj, kiuj ne komprenis, ne bezonatis! Esperantistoj do vere kapablas pli da lingojn!

Post du-foja vizito al tiu urbo en plena suno, nun la ĉielo pro kaŭzo, kiun mi ne tute komprenis, iom ploretis. Ne sufiĉe por forigi la homojn de la strato, nur por ke kelkaj tamen surmetu ion sur la kapon, aŭ ŝirmis ĝin pere de pluvombrelo. Ne gravis, ĉar la etoso estis gaja!

Estis amuze konstati la silentan aŭskultadon al la gvidistino, kaj poste promenante al sekvonta vidindaĵo, inter ni Esperanto

regis la paroladon. Tiom interesa estis la promeno, kaj ni finfine devis hasti tra malgrandaj stratetoj por alveni ĝustatempe por la tagmanĝo.

Lokajn bongustaĵojn oni rajtis mem preni el la potoj, kelkaj abunde, aliaj iom pli ŝpare, ĉar ni estis surprize multaj homoj. Nu ja, ĉiuj scias, ke vi povas organizi ĝis malgrandetaj detaloj, kiel ĉe sur la nomŝildo aperigi, kion oni mendis antaŭe, kaj pagis por ĝi. Se oni tro fidas, ne kontrolante... povus esti, ke la lastaj.... hihhihi, tamen laŭ mi neniu mortis pri malsato.

Poste al la tablo Heinz ankoraŭ venis por porti pli da desertoj, forpreninte de homoj, kiuj ne plu sciis, ke ili ne mendis ĝin, hihhihi. Estis amuze, kiel ĉiuj trovis lokon por trankvile manĝi en amika rondo.

Posttagmeze prezentadojn kaj prelegojn ni ĉeestis, kiam alia grupo partoprenis la duan gviditan promenon en Hameleno, sub pli kontenta seka ĉielo. Helmut Klünder prezentis al ni la orientfrisajn insulojn. Post la lasta gustumado, varma grogo, kiu ankaŭ al la aliĝantoj por la sekvonta prelego estis prezentita, venis Heinz W. Sprick mem kaj rakontis al ni pri “Vojaĝo tra Israelo kaj Jordanio”. Kiaj belegaj bildoj, kia belega naturo, kvankam ne multo kreskis sur tiuj ruĝaj montoj. Kia aventuro! Ĉiuj konas Heinz sufiĉe bone por scii, ke li surprizas ĉiam, pro sia aŭdaco, originaleco, kaj ĉarma flua parolo, ĉu ne?

Intertempe ie en la urbo okazis renkontiĝo antaŭ la Münster-preĝejo kun klarigoj pri la nova Eskap-Ĉambro en la kelo de la Münster-preĝejo. Kiu kuraĝis lasi transmeti sin reen en la tempo de la jaro 1284 kaj sukcese solvi ĉiujn enigmojn en la malnova alhemiista kelo ene de unu horo? Nur helpas bona grupa agado. Pri kiu mi nenion scias, ĉar mi ne partoprenis, sed poste aŭdis de la aliaj, ke ili sukcese solvis ĉion kaj ĝuis la temposalton.

Unu post la alia la muzikistoj/kantistoj alvenis, kio rezultigis en abundaj knuffladoj kaj demandoj pri la vivo de unu kaj de la alia, ktp. Kiel aliel bonvenigi karajn amikojn? Ili preskaŭ tuj provludis kaj poste planis vespermanĝi.

Tiam Waltraut iris kun ni hejmen, kie ni denove renkontiĝis kun la filo kaj la nepoj. Jes, nun ankaŭ la plej malgranda sidis ĉe tablo, iom timema, tamen ne por longe. Mia urseto, jam anoncita de avinjo Waltraut, forvaporigis la infanan timon kaj post nelonge ni ĉiuj plene ĝuis la vespermanĝon.

Mi certe ne devas priskribi la agadon kun Kajto-kantistoj, ne eblas, ke iu ne jam konas ilin, ĉu ne? Do estis du partoj de kantado kaj de kunkantado de kaj kun ili. Kaj fin-fine estis ankaŭ kundancado. Bone, unue ekzerci kiel fari tiun dancadon, kiu datis de longe longe for! Tiuj, kiuj restis surseĝe,



Esperanto-tagoj en la kulturcentro Sumpflume.
Foto: Heinz Sprick



malpravis! Estis mojosa momento de granda interamika Esperanta internacieco.

Kaj tuj poste, do sen granda paŭzo, saltis sur scenejon Johny M, kiun mi konsideras kiel EO-nepo de mi. Ĉu surpriziĝis iu, ke la danospaco ne plu malpleniĝis? Regea hiphop-kantado de energiplena junulo, kiu regas la scenejon kiel sia propran vivĉambron, entuziasmigas ĉiujn! La drathara frizuro ne unu momenton maldancis! Ankaŭ la membroj de Kajto plezure kundancis. Tiu vespero vere amuzis ĉiujn! Iom pli malfrue ol pripensite, finfine ĉiuj iris direkten al lito, mi pensas. Vere certe mi ne scias, ludemaj homoj ĉiam troveblas en EO-renkontiĝoj. Tamen ni iris hejmen kun Waltraut. Klaus jam delonge dormas, mi pensis, tamen ne! La viroj atendis nin tute kavalire. Lastan knufflan rondon – kaj ek en la liton!

Dimanĉe matene, denove nekredebla plena tablo bonvenigis nin al la matenmanĝo. Ni tiom longe ĝuis ĝin, ke ni maltrafis la komencon de la prelego de Bernard Larue, pri la rondirado tra Usono. Nur kelkajn movantajn bildojn de bizoni mi en okulpinto vidis, rapide enrigardante la salonon. Tamen, estis en la alia salono pulbazaru. KREDU MIN, ne rezisteble por personoj kiel mi, kaj post la prelego mi denove aperis kune kun la bofratino kaj iom da sakoj da varoj, hihhihi.

Intertempe dua grupo estis for por solvi la enigmojn en la ĉambro kaj kelo de la Münster-preĝejo. Ankaŭ de ili mi ne aŭdis ian ajn klarigon. Do, vi mem esploru tion, kiam vi iam venos al Hameleno.

La kurseto de Frank Lappe pri “Unua Helpe/Sukurado” estis vigla agado, ŝajne kelkaj ne estis kompletaj laikoj. Frank kunhavis multege da materialoj kaj ekzercigis partoprenantojn sur speciala pupo, post kiam li faris la siajn helpe de la viktimo Heinz W. Sprick mem, ridiga afero. Humoro neniam manku en prelegoj kaj instruadoj, dankon ankaŭ al vi, Frank!

Finon de la renkontiĝo ni festis dum komuna tagmanĝo en la najbara ĉina restoracio “Shangri La”, kaj vere la manĝelekto estis abunda, varia, bongusta, alloga, kaj surprize malaltpreza!

Unu post la alia denove malaperis, kelkaj nur post varmaj amikaj knuffoj, kelkaj iom pli longe restis. Ni reordigis la salonon, pakis la librosservon, kiu estis ege bonvena. Reknufflis lastfoje kaj kun Waltraut denove “rehejmiĝis”. Ni jam pakis ĉion matene, do havis iom da tempo ankoraŭ por kafumi kaj regaliĝi per membakita kuko de mia bofratino, kaj pri

malvarma hundo. Ĉu vi ne konas “malvarman hundon”? Tiam nepre ĉeestu iun renkontiĝon, kie aperas Gunter. NoRo ekzemple, hihhihi.

Jes, mi konfesas, ke ni estis lacaj, ambaŭ, mia bofratino kaj mi, kiam ni ekis denove por ĉiutaga hejmo, tamen babilante pri ĉiuj belegaj momentoj de tiu semajnofino inter amikoj, ni en nur 3 horoj denove estis en niaj propraj litoj. Ŝi, kompatinda ino, tuj devis jam frue labori lunde, mi rajtis iom pli longe dormi, kaj sonĝi pri Hameleno, el kiu Waltraut kaj Klaus iam vizitos nin en nia hejmo. Heinz W. Sprick metis jam la daton de la Beneluxa kongreso en sian agendon, kaj do venos.

Neniam renkontiĝoj vere haltas, unu allogas al la sekvanta, kaj ĉie amikaro atendas unu la alian por travivi belegajn momentojn kune. Do, ni neniam vere adiaŭas, iam ni certe revidos nin!

Skribite kun granda dankemo al ĉiuj miaj EO-amikoj. Listo tro longa por aldoni. Kaj kial mi faru tion? Ĝi kuŝas tute sekure ĉe la organizantoj. Se vi volas enrigardi ĝin, demandu ilin!

N Nicky Janssen

Esperanto- Buchversand bei Mainzer Büchermesse

Der Esperanto-Buchversand nahm erfolgreich an der Mainzer Büchermesse teil, die vom 18.-19. November im Rathaus der Stadt Mainz stattfand.

Der Leiter, Dr. Wolfgang Schwanzer, präsentierte in einem Vortrag "Esperanto - eine geplante Sprache und ihre Literatur". Er stellte kurz die Entwicklung, die Ziele und die Grammatik vor und gab einen Überblick über die Esperanto-Literatur. Noch wichtiger empfand er die zahlreichen Gespräche mit Interessenten an Büchertisch. Auf großes Staunen stieß vor allem die Vielfalt der bunten Exemplare des Lehrbuches Esperanto direkt von Stano Marček, das inzwischen in 40 Sprachversionen erschienen ist. Dies war ein beeindruckender Beleg dafür, dass Esperanto inzwischen weite Verbreitung gefunden hat. Ein Blickfang für jeden Büchertisch. Die Büchermesse, bereichert mit einem umfassenden Rahmenprogramm, wurde erneut vom Kulturamt der Stadt Mainz organisiert. Dort hörte man erfreut, dass die Stadt Mainz in Esperanto-Kreisen einen Namen hat. Fand doch 1958 in Mainz der 43. Esperanto-Weltkongress statt, mit initiiert vom damaligen Oberbürgermeister Franz Stein, der selbst Esperanto sprach.

Es zeigte sich erneut, dass viele Besucher den Begriff Esperanto richtig einschätzen konnten, aber bisher noch nie real mit der Sprache in Berührung gekommen waren. So resümierte Dr. Schwanzer: "Wir müssen viel mehr deutsch reden, wenn wir Esperanto fördern wollen."

Ab Februar 2018 ist der Internet-Auftritt des Esperanto-Buchversandes komplett neu gestaltet und die Funktionen sind erheblich erweitert worden. Unter der neuen Adresse



Wolfgang Schwanzer präsentiert eine Buchauswahl auf der Mainzer Messe.

www.esperanto-buecher.de werden die Bücher nun zeitgemäß, auch für Mobiltelefone, präsentiert.

Die Darstellung der Buchtitel wurde verbessert, Neuerscheinungen werden angezeigt, es gibt Hinweise auf die Verfügbarkeit und auf die zuletzt angesehenen Titel. Für Bestellungen ist eine Registrierung weiterhin nicht erforderlich, aber möglich und mit einigen Erleichterungen verbunden. Nicht verändert hat sich unsere vertrauensvolle Beziehung zu unseren Kunden: wir versenden auch weiterhin mit Rechnung, zahlbar erst nach Erhalt der Ware.

Schauen Sie sich im Angebot um, zahlreiche Neuerscheinungen erwarten Sie hier: www.esperanto-buecher.de

Mit freundlichen Grüßen

Dr. Wolfgang Schwanzer,
Esperanto-Buchversand

Hinweis: Die bisherigen Seiten www.esperanto-buchversand.de bleiben bestehen, so dass Sie auch weiterhin das gewohnte Verfahren nutzen können. Allerdings werden die Angebote nach und nach modifiziert.

Belegaj tagoj en Svitavy

**Pri la nova Esperanto-muzeo en Svitavy, sur
la apuda foto, mi legis antaŭ ĉirkaŭ 9 jaroj
– kaj de tiam mi deziris viziti ĝin.**

Nun estis la okazo: Internacia Renkontiĝo en Svitavy – la 22-an – 28-an de septembro 2017. Mi partoprenis nur kvar tagojn, sed mi revenis hejmen plena de impresoj kaj de ĝojo pri la travivaĵoj tie.

Ni estis 28 personoj, krom la ĉefoj unu brito, tri francoj, tri poloj, du germanoj kaj unu slovako. Ĉefe interesis ĉiujn la

muzeo mem, kiu ekestis nur dank' al la bona, obstina laboro de la Esperanto-grupo. La vitrinaj, plenaj de eksponaĵoj el la tuta mondo, bone prezentataj. La grupo organizas kursojn, akceptas ofte Esperanto-grupojn kaj faras por ili programon, kiel en septembro 2017.

Mi listigas nur la ĉefajn vidindaĵojn, kiujn ni havis la ĝojon viziti: La urbo Svitavy mem, vidinda kun la grandega foiro, arkadaj domoj ambaŭflanke, la nova stadiono, la migrado tra la akvoarbaro. Krome Svitavy estas la naskiĝloko de Oskar Schindler, konata kiel savanto de 1200 judoj dum la nazia tempo. En la urba muzeo troviĝas daŭra ekspozicio pri li kaj en parko antaŭ la iama domo de liaj gepatroj staras monumenta ŝtono, kiu memorigas pri li.

Dum tuttaga ekskurso ni vizitis la muzeon de pupteatraj kulturoj en la urbo Chrudim kaj la skanzenon „Veselý Kopec“, t.e. „Gaja Monteto“ – 28 domoj el la regiono, rekonstruitaj por ekkoni, kiel loĝis la homoj antaŭ jarcentoj.

Do, kiel dirite, la vizito tie estas tre valora travivaĵo por gesamideanoj. Tial mi diras: veturu tien! Per trajno oni devas ŝanĝi la vagonaron en Prago, poste ankoraŭ veturi du horojn per regiona trajno. La tre zorgema ĉefino estas Libuše Dvořáková. La adreso estas: Esperanto-Muzeo en Svitavy, Náměstí Míru 1, CZ-56802 Svitavy, Ĉeĥio. Tel.: +420 461 532 704 (en la germana), +420 604 377 616 (en Esperanto), rete: esperanto@muzeum.svitavy.cz; reta prezentado: www.muzeum.esperanto.cz

Johano (Johannes) Moser



Kanto en Esperanto: "Gardi la revon"

Seit kurzem lerne ich Esperanto, insbesondere auch mit dem Ziel, darin Lieder zu verfassen.

Nun ist Esperanto zwar relativ schnell erlernbar, aber zwei Monate sind doch zu kurz, um schon fehlerfrei anspruchsvollere Texte formulieren zu können, und so bin ich dankbar, dass die Esperantokenner Bernhard Schwaiger und Rudolf Fischer Korrekturhinweise zu meinem ersten Entwurf gaben. Die Noten des Liedes sind in dieser Ausgabe abgedruckt und man kann es auch auf [youtube.com](https://www.youtube.com/watch?v=OxPMDIHNTA) hören, wenn man dort nach dem Titel „Gardi la revon“ sucht.

Das Lied setzt sich mit dem bekannten, oft variierten Bonmot auseinander, wer mit 20 die Welt nicht verbessern wolle, habe kein Herz, und wer das mit 40 immer noch wolle, habe keinen Verstand. Dem setzt das Lied, frei nach Gramsci, die Aufforderung entgegen, sich trotz des Pessimismus des Wissens den Optimismus des Wollens zu bewahren. Eine Aussage, für die m.E. keine Sprache passender ist als Esperanto!

Aber wie bin ich überhaupt zu Esperanto gekommen? In der letzten Zeit habe ich unter dem Künstlernamen Krzysztof Daletski einige Lieder zu heutigen Themen geschrieben, von denen einige zusammen mit meiner Tochter gesungen auf CD erschienen sind (siehe [songs.dalito.de](https://www.songs.dalito.de)). Die sind allerdings deutschsprachig, denn wenn ich mich z.B. kritisch auseinandersetze mit Euphemismen von Militarisierungs-Befürwortern („Auslandseinsatz“, „robustes Mandat“, „Verantwortung übernehmen“), dann erschließen sich die darauf aufbauenden satirischen Wortspiele nur deutschen Zuhörern. Für Lieder zu universelleren Themen erschien mir Deutsch aber zu

regional beschränkt und ich suchte eine neutrale universelle Sprache.

Zunächst fiel meine Wahl auf Latein, das ich noch aus der Schule kannte, und so sind zwei lateinische Lieder entstanden. Allerdings stellte sich Latein aus mehreren Gründen als problematisch heraus (elitär, keine allgemein anerkannte neulateinische Aussprache, fehlende Musiktradition). Aber durch diese beiden Lieder bin ich mit Bernhard Schwaiger in Kontakt gekommen, der bei Radio

F.R.E.I. die Sendung „Erfordia Latina“ herausgibt, und er hat mich auf Esperanto hingewiesen. Natürlich wusste ich schon vorher, dass es Esperanto gab, aber erst daraufhin habe ich es mir näher angesehen und dessen klare und doch flexible Struktur hat mich gleich fasziniert. Letztlich überzeugt haben mich dann die vielen gelungenen Beispiele von Esperanto-Musik, die ich mir daraufhin angehört habe. Do mi nun lernas diligente Esperanton!

Christoph Dalitz

Gardi la revon

Teksto & muziko: Krzysztof Dalecki, 2017
C7

DM
Ki·am mi es·tas ju·na kun ko·ro pa·si·a, Pli·bo·ni·gi mi vo·lis
C7 F A7
ĉi·on a·ĉan de l' mond'. Sed a·dol·toj a·ser·tis, ke ne es·tas far·
DM DM GM GM6 A4 A DM
eb·le, ke nur eb·las e·lek·ti i·ĝi lu·po aŭ ŝaf. Sed mi sen·tis,
DM A4 3 A7 DM
ke l' mon·do ne de·vas es·ti ti·a ki·a jen es·tas ĝi. Kaj mi
GM DM4 3 A7 DM
re·vis pri mon·do pli jus·ta, kaj mi gar·dis ti·un re·von en mi.
Horo C C7 F
Mi gar·dis la re·von, ti·un re·von en mi.
F6 A7 DM
Mi gar·dis la re·von, ti·un re·von en mi.

Pli maljuna mi vidis tiom multajn anĝi / En la roto de lupoj kun loganta elkri:
Venu! Venu vi ankaŭ! Tio ĉi estas plaĉa: / Jam rostiĝas la karno de la ŝafoj en gras'.
Sed mi vidis ke l' mondo ne devas / esti tia, kia jen estas ĝi.
Kaj mi revis pri mondo pli justa / kaj mi gardis tiun revon en mi.
Horo: |; Mi gardis la revon, tiun revon en mi. |;

Nun mi estas maljuna kun kor' afliktita / Ĉar mi povis apenaŭ ŝanĝi ion de l' mond'.
Kaj mi petas indulgon de miaj gefiloj, / Sed ili ridetas respondante al mi:
Jes, ni scias ke l' mondo ne devas / esti tia, kia jen estas ĝi.
Kaj ni revas pri mondo pli justa / kaj ni gardis tiun revon en ni.
Horo: |; Ni gardis la revon, tiun revon en ni. |;

Dies Lied steht unter der Creative Commons Attribution-Share Alike 3.0 Germany License.
und darf kostenlos kopiert, verbreitet, gesungen und aufgenommen werden.

La kanto aŭdeblas (karaokeo!) ĉe:
<https://youtu.be/OxPMDIHNTA>

Kazuo Iŝiguro, nobelpremiito pri literaturo 2017

Ekde 2004 Wolfgang Kirschstein ĉiujare prezentas en “La Ondo de Esperanto” ĉiun novan nobelpremiiton pri literaturo. Por la novembra kajero de “La Ondo de Esperanto” li verkis sian 14-an sinsekvan artikolon – ĉi-foje pri la japana anglalingva prozisto Kazuo Iŝiguro, nobelpremiito pri literaturo 2017. Lia artikolo, titolita “Artisto en ŝanĝiganta mondo” kaj publikigita en “La Ondo de Esperanto”, aperis ankaŭ en la novaĵretejo “La Balta Ondo” (<http://sezonoj.ru/2017/11/kazuol/>)

Ekspozicio pri Zamenhof ĉe la itala Parlamento

Lunde la 6-an de novembro oni inaŭguris ekspozicion pri Ludvik Zamenhof, organizitan de la ambasadejo de Pollando en Romo kaj de Itala Esperanto-Federacio. “La iniciatinto de Esperanto, 1859-1917” estis vizitebla ĝis la 20a de novembro ĉe la Biblioteko de la Deputita Ĉambro kaj konsistis el vertikalaj paneloj kaj alternaj horizontalaj vitrinaj pri la jenaj temoj: mondaj kaj italaj literaturaĵoj, tradukitaj en Esperanton, infanaj libroj, esperantologio, turismaj gvidlibroj, religioj, fotoj atestantaj la sekvojn de nuklea bombado super Hiroŝima kaj Nagasaki, la paco-premio “Zamenhof” por pli justa mondo, kun fotoj de kelkaj gajnantoj, plej konataj en Italio. La inaŭguron partoprenis 50 invititoj, ĝenerale konsilantoj de ministerioj, diplomatoj, oficistoj de la biblioteko kaj kelkaj esperantistoj. Inaŭgurajn paroladojn faris la aferŝarĝito de la pollanda ambasadejo Marta Zielińska-Słiwka, la prezidanto de la Komisiono pri eksterlandaj aferoj de la Deputita Ĉambro Fabrizio Cicchitto, la itala ambasadoro en Norvegio kaj Islando Giorgio Novello kaj la prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, Michela Lipari, kiu poste gvidis la gastojn al vizito de la ekspozicio. La itala publika nacia televido filmis la inaŭguron kaj la tutan ekspozicion, kiu estis vizitebla ĝis la 20-a de novembro. (www.uea.org)

El Pollando al Hispanio

La nova podkastaĵo de Varsovia Vento *Elsendoj*, kun raportoj, intervjuoj kaj memoraĵoj, aperis en la reto, en la adreso: <http://www.podkasto.net/2017/10/10/la-125a-elsendo/>. Ankaŭ estas spektebla la video “Aragono 2017”, filmo de



Roman Dobrzyński, produktita en kunlaboro kun la podkasto Varsovia Vento, dum lia vizito al aragonaj urboj okaze de la prezentado de lia verko “La Zamenhof-strato”, en Zaragozo kaj dum la Hispana Kongreso de Esperanto en Teruelo. Jen la adreso: https://www.youtube.com/watch?v=Xye_3Ye2kWU.

(*Bitbulteno, esperanto.es*)

La itala lingvo meritas solidarecon

Kiel konate, ankaŭ la aliaj eŭropaj lingvoj estas sub la premo de tutmondigo, ne nur la germana. La itala profesoro pri juro Maria Agostina Cabiddu el Milano gajnis signifan venkon por pli ol 100 instruistoj de altlernejoj antaŭ la konstitucia juĝejo en Romo: La intenco de la teknika universitato de Milano, ŝanĝi ĉiujn ekzamenojn por magistroj kaj doktoroj al la angla, estis deklarita kiel kontraŭkonstitucia. Similaj intencoj ekzistas ĉe la teknika universitato de Munkeno. Cabiddu verkis peticion al la prezidanto de la Itala Respubliko Sergio Mattarella, en kiu ŝi postulis novan lingvan politikon, kiu respektu la staton de la itala lingvo kiel la oficiala lingvo. Ekzistas interreta peticio: adawis.de, change.org.

(Verein Deutsche Sprache e. V. - Infobrief)

Hispanio: Esperanto en oficialaj lernejoj

En tiu ĉi lernejo komenciĝis instruado de Esperanto ankaŭ en oficialaj centroj. Konkrete, meze de oktobro komenciĝis en la Universitato de Sevil universitata kurso “Esperanto: akademia lingvo”, kun agnosko de 6 kredit-poentoj, validaj por ĉiuj fakoj de la universitato kaj kun ĉeesta daŭro de 3 horoj semajne. La aktivado daŭros ĝis mezo de junio 2018 kaj la fina celo estas faciligi la atingon de la oficiala diplomo de la nivelo B1. Ĝin gvidas la profesoro Vicente Manzano-Arrondo (esperanto@us.es). Ankaŭ en la Universitato de Sevil, ene de la Fakultato de Psikologio, estas studobjekto nomata “Metodología Cualitativa”. Ĉiujare la studentoj lernas pere de la esplorado konkretan aferon. Ĉi tiu kurso temas pri lingva subpremado kaj Esperanto kiel liberigilo. Kelkaj el la studentoj lernas pri subpremado, la diskurso pri la neceso de la angla ktp. Kelkaj faras sian esploron ĉefe pri Esperanto. Tiuj aranĝis blogon kaj nun kelkaj el ili bezonas intervui esperantistojn per diversaj metodoj. Dume en la Madrida Regiono fine de oktobro komenciĝis kurso de Esperanto en la Oficiala Lingvolernejo de Fuenlabrada. La aliĝo estas senpaga kaj la klasoj okazas marde vespere. (*Bitbulteno, esperanto.es*)

Esperanto ĉe la Eŭropa Tago de Lingvoj en Vieno

Laŭ raporto de Seán Ó Riain: “Pli ol 300 homoj ĉeestis la Vienen feston de la Eŭropa Tago de Lingvoj, organizita de la Eŭropa Komisiono en Eŭropa Unio-Domo, la 23-an de septembro. Esperanto rolis inter la legataj lingvoj, kaj la homoj aparte multe aplaudis kiam oni prezentis ĝin. Antaŭ ol legi en la irlanda, mi trovis okazon diri ke mi tre ĝojas ke la samrajtiga lingvo, Esperanto ĉeestas nian lingvan feston. Konferenco

pri eŭropa multlingvismo fare de la profesorino Eva Vetter el Viena Universitato komencis la vesperon. La ĉefa evento konsistis el 1-minutaj legadoj de la populara infanlibro "Pipi Ŝtrumpolonga" en 35 lingvoj. Krom la oficialaj EU-lingvoj, oni legis en la rusa, turka, japana, georgia, hebrea, Esperanto, kimra, kataluna, luksemburgia, albana, svisgermana kaj eĉ la viena kaj vorarlberga dialektoj de la germana. Ne nur la kroata estis legata, sed ankaŭ la burgenlanda kroata. Ĉar la libro ne estis tradukita al la irlanda, mi faris mian propran tradukon kaj legis ĝin ĉe la festo. La kimran legadon faris s-ino Nerys Jones, brita diplomato, kaj mi poste parolis kun ŝi en la kimra lingvo. Bernard Tuidar (Esperanto-Muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj) kaj mi multe babilis en Esperanto, kaj pluraj homoj diris al mi poste, ke estis la unuan fojon, kiam ili aŭdis Esperanton.

(Seán Ó Riain en *Eŭropa Bulteno*,
<http://www.europanet.eu/>)

Nova materialo en la retejo Bitoteko

En la interreta biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio troviĝas ne nur libroj kaj gazetoj. Oni povas tie trovi ankaŭ bildojn, afiŝojn, poŝtkartojn, fotografaĵojn, partiturojn kaj alian materialon, ĉiujn kun rilato al Esperanto. Esploru kaj trovu juvelojn ĉe:

<http://www.esperanto.es:8080/jspui/community-list>.


UEA-interveno ĉe UN en Ĝenevo

Dum la 10-a Forumo pri Minoritatoj, la 30-an de novembro 2017, kvar membroj (Nicole Margot, Stefano Keller, Cescio Reale kaj Adrian Tanner) de la Ĝeneva teamo de UEA-reprezentantoj ĉe UN partoprenis la 10-an sesion de la Forumo pri Minoritatoj en la Palaco de Nacioj, la 30-an de novembro kaj 1-an de decembro 2017. Diverslingvaj versioj de la alparolteksto, sonregistraĵoj estos publikigitaj en la retpaĝo:

www.linguistic-rights.org/eventoj/eventoj.html#MF10
(Stefano Keller, www.uea.org)

Oficiala ceremonio pri Zamenhof ĉe Unesko en Parizo

La 11-an de decembro okazis oficiala ceremonio en la sidejo de Unesko en Parizo, honore al la Zamenhof-jaro.



La ceremonion iniciatis la pola delegacio, gvidata de la ambasadorino Krystyna Żurek. Antaŭ multnombra publiko nur parte esperantlingva, en ĉeesto de tri gefamilianoj de Zamenhof (lia nepo Louis Christophe, ties filino Maryse Wanda kaj nepo Pierre), alparolis sep prelegantoj: Sébastien Moret (Svislando), Jean-Claude Lescure (Francio), Guilherme Fians (Brazilo), Chuck Smith (Usono), Trezoro Huang Yinbao (Popola Ĉinio), Giorgio Novello (Italio). Funkciis samtempa interpretado, inkluzive de Esperanto. En la fokuso de la tago estis ankaŭ la Esperanto-varianto de la revuo "Kuriero de Unesko", redaktata de s-ro Trezoro Huang Yinbao. Dum la enkondukaj vortoj s-ino Renée Triolle, ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio en Francio, laŭtlegis saluton de la direktorino de la Monda Kultura Heredaĵo de Unesko, kiu mem lernis Esperanton denaske.

(<http://esperantio.net/>, HeKo 667 5-A, 11 dec 17)

Trezoro Huang Yinbao: la Esperantisto de la Jaro 2017

La internacia sendependa magazino "La Ondo de Esperanto" en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 2017 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis la dudekan fojon. Trezoro Huang Yinbao, 55-jara ĉina agronomo, ekonomikisto kaj entreprenisto, prezidanto de la Esperanto-Centro "Ora Ponto", kunfondinto de la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio, estas elektita la Esperantisto de la Jaro 2017 pro tio, ke en 2017 li iniciatis kaj ekredaktis la Esperantan version de "Unesko-Kuriero", kunmetis por ĝi tradukteamon, kaj krome lanĉis la sendependan revuon "Tra la Mondo". Trezoro Huang Yinbao estas la unua aziano, ricevinta ĉi tiun honoran titolon. En 2017 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis la dudekan fojon. Ĉi-jare 17 kandidatigantoj proponis 20 kandidatojn, al kiuj 18 elektantoj jene donis siajn voĉojn: Trezoro Huang Yinbao — 11 voĉoj, Hori Jasuo — 8 voĉoj, Richard Delamore (Evidea) — 5 voĉoj. Kvar kandidatoj ricevis po du voĉojn, ses kandidatoj ricevis po unu voĉon.

(La Balta Ondo, <http://sezonoj.ru/2017/12/trezoro-10/>)

Kunveno "Esperanto kaj Unesko" en Italio

Sabaton la 16-an de decembro ĉe la Instituto pri italaj-norvegaj studoj de la urbo Tolfa (proksime de Romo) okazis laŭ invito de la urbestro la kunveno "Esperanto kaj Unesko", kiu estas la lasta oficiala aranĝo, organizita de Itala Esperanto-Federacio por celebri la Zamenhofan jaron. Ekparolis la urbestro Luigi Landi, lia ambasadora moŝto Giorgio Novello, dum lia lasta tago de servo kiel ambasadoro de Italujo en Norvegujo, Magdalena Trudzik, la unua sekretario de la Ambasadejo de Pollando en Italujo, Michela Lipari, Prezidanto de IEF, Rakoen Maertens, belga junulo, kiu mallonge prelegis la 11-an decembro en Parizo ĉe Unesko, kun traduko de Pierre Caliani, Otto Prytz, norvega akademiano per mallonga saluto

registrita, Stanislaus de Marsanich, prezidanto de la literaturaj parkoj. La spektantaro, plejparte neesperantistoj, konsistis el studentoj de mezlerneja klaso, el la direktoroj de la biblioteko kaj kultura instituto kaj aliaj lokuloj. La urbestro, impresita de la paroladoj de la partoprenantoj, tuj petis aranĝi aliajn kunvenojn por prezenti aliajn aspektojn de la lingvo kaj de la movado, kiu kaŭzis tiom da intereso ĉe la ĉeestantoj.

(www.esperanto.it/)

6 jarkolektoj de "La Ondo de Esperanto" senpage legeblaj

Antaŭ 11 jaroj, en januaro 2007, komencis aperi la elektronika versio de la "La Ondo de Esperanto". La redakcio post paso de 5 jaroj senpage disponebligas malnovajn jarkolektojn. Ĝis estis enretigitaj la pdf-versioj de ĉiuj numeroj de la jaro 2012. Krom pli ol 2 centoj da primovadaĵaj artikoloj, kiuj perdis sian aktualecon, en ĉi tiu jarkolekto aperis pluraj daŭre interesaj artikoloj pri diversaj temoj, multaj recenzoj, originalaj kaj tradukitaj beletraĵoj kaj dek-artikola ciklo pri Esperanto-poetoj de Zamenhof ĝis Mao Zifu en la rubriko "Nia trezoro". Nun 6 jarkolektoj de "La Ondo de Esperanto" (2007, 2008, 2009, 2010, 2011, 2012) estas libere elŝuteblaj ĉe <http://esperanto-ondo.ru/Lode-old.htm>

En la sama retejo estas ankaŭ ligiloj al la demonstraj versioj de ĉiuj pasint-jaraj "Ondoj".

"La Ondo de Esperanto" (11 numeroj laŭ "pdf" kaj "ePub" + literatura suplemento), kies januara numero jam aperis, estas abonebla por la tuta jaro 2018 kontraŭ nur 15 eŭroj ĉe la perantoj, UEA-konto, kaj per PayPal/bankkarto ĉe

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Filmkonkurso "Teo kaj Amo"

En oktobro Ĉinio gastigis gajnintojn de la 2-a Konkurso de mallongaj filmoj "Teo kaj Amo", kiun sub la aŭspicio de UEA en 2014 lanĉis la Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia (ĈRI). Partopreni povis profesiaj kaj amatoraj filmistoj. Ĉiu filmo devis esti ne pli ol 15-minuta kaj nepre rilati al ambaŭ temoj: "teo" kaj "amo". Se dum la unua konkurso "amo" signifis



korajn rilatojn inter viro kaj virino, en la 2-a la organizantoj plivastigis la sencon de la elemento "amo" kaj akceptis filmojn, kie aperas amo al iu ajn subjekto aŭ objekto: al homo, libro, vivo, Esperanto ktp. Estis akceptataj filmoj en iu ajn lingvo. ĈRI anoncis donaci al reprezentantoj de la 10 premiotaj filmoj senpagan vojaĝon al Ĉinio por 7 tagoj oktobro de 2017. La 10 premioj estis: Plej bona filmo, Plej bona scenaristo, Plej bona reĝisoro, Plej bona desegnofilmo, Plej bona originala muziko, Plej bona ĉefaktoro, Plej bona ĉefaktorino, Plej bona kameraisto, Plej bona muntisto, Speciala(j) Premio(j). Do entute por la dua filmkonkurso la organizantoj kolektis 79 filmojn el 27 landoj. La premidona ceremonio okazis la 26-an de oktobro en teatro de la gubernio Dushan. Sur la ruĝa tapiŝo al la teatro iris reprezentantoj de Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Kubo, Litovio, Pollando, Ruslando, Slovakio, Suda Koreio, Svislando kaj Usono. Inter la spektantoj de la ceremonio estis ne nur festivalanoj, sed ankaŭ gravuloj de la urbo, ĵurnalistoj de ĈRI kaj ekstera publiko, kiu pagis por aĉeti la enirbiletojn. Por la evento estis uzataj 2 lingvoj – Esperanto kaj la ĉina. Dum la ceremonio oni povis spekti filmojn de ĉiuj premiitoj kaj honore aplaŭdi, kiam la gravuloj enmanigis diplomojn, pokalojn kaj florojn al la gajnintoj, kunlaborantoj kaj urboj de "Teo kaj Amo". La ceremonion ĉeestis kaj oficiale parolis la prezidanto de UEA Mark Fettes, kaj pranepino de L. Zamenhof Margaret Zaleski-Zamenhof.


(Olga Shiliaeva, *La Ondo de Esperanto*, 2017, №12,

La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2017/11/filmo>)



Unesko-Kuriero, la 3-a numero aperis

Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi komencis aperis en la jaro 1946. Meze de la jaro 2017 UEA lanĉis projekton pri *Unesko-Kuriero* en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto (Ĉinio). Aperis la 3-a numero de 2017 (oktobro-decembro),



kiu, same kiel la du antaŭaj, estas senpage elŝutebla en la retejo de UEA laŭ la formato "pdf": https://uea.org/revuoj/uneko_kuriero

(La Balta Ondo, <http://sezonoj.ru/>)

Novstila kurso lanĉiĝas en Seulo

S-ino Brila, sperta esperantistino el Seulo, post sia 10-minuta prezentado de "Ili elektis la pafilon, mi la kameraon" (el la 3-a numero de *Uneko-Kuriero*): "Historia kurso!" En decembro gelernantoj de la Seula E-Centro en Koreio ekpartoprenis en tute nova kurso por esperantistoj, kiu utiligas la novan revuon *Uneko-Kuriero* kiel bazan lernomaterialon. Tiu novstila kurso estas la rezulto de la organiza laboro de la Seula E-Kulturcentro, fondita de Lee Jungkee, kaj la kurso-kreaĵo de Dennis Keefe, instruisto de Esperanto. La ideo instrui specialan kurson utiligantan la artikolojn el la *Kuriero* estiĝis en ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, kiam Trezoro Huang Yinbao anoncis la novan revuon dum la Komitata kunveno. En la kurso partoprenas pli ol 10 lokaj esperantistoj kun sufiĉe alta nivelo de Esperanto por legi kaj esprimi sin klare kaj konvinke. La kurso okazas centprocente en Esperanto, nekutima afero en plejparto de la aziaj kursoj, en kies akvoj ofte abundas verdaj krokodiloj de ĉiaj specoj. Unu el la partoprenantoj estas junulo kiu eklernis Esperanton nur pasint-jare per Duolingo, kio montras, ke eĉ en Azio la influo de tiu nova reta lecionaro komencas helpi la tradiciajn lokajn grupojn. La kurso disvolviĝas lernanto-centre, kaj la kursgviganto (ĉi-foje, Dennis Keefe) ne aktive instruadas. Estas la gelernantoj mem kiuj elektas la kurso-enhavon el la paĝoj de *Uneko-Kuriero*, kaj kiuj prezentas tiun materialon laŭ sia bontrovo. La kurso-strukturo konsistas el tri ĉefaj partoj. En la unua parto (5-10 minutoj) unu lernanto prezentas unu artikolon, kiun li aŭ ŝi legis kaj trastudis en unu el ĉi-jaraj numeroj de *Uneko-Kuriero*. En la dua parto ĉiu el la 12 gelernantoj estas kuraĝigitaj starigi unu demandon aŭ fari unu komenton al tiu, kiu ĵus prezentis. En la tria parto la kursgviganto faras, tre mallonge kaj ne altrude, unu aŭ du sintezajn komentojn pri la prezentado kaj/aŭ pri la posta interdiskutado. Post kiam la unua prezentanto faris sian paroladon kaj la kursanoj diskutis la enhavon kaj finfine la kursgvigantoj faris unu aŭ du rimarkojn, la dua prezentanto donas sian paroladon pri alia artikolo el la

kuriero. Inter 4 kaj 6 lernantoj tiamaniere prezentas ĉiusesie. Por la ekstera mondo la celo de la kurso estas montri, ke la gravaj temoj prezentataj en *Uneko-Kuriero* povas esti plene diskutataj Esperante de esperantistoj. Esperanto estas vivanta lingvo, kiu povas funkcii en ĉiaj fakoj. Aliflanke, por la esperantistoj mem, la celo estas informiĝi pri Unesco kaj samtempe plibonigi sian Esperanton: vorte kaj esprime, gramatike kaj parolstile.

(Dennis Keefe, *La Ondo de Esperanto*, 2018, nr-o 1, La Balta Ondo, <http://sezonoj.ru/2017/12/koreio-4>)

Roman Dobrzyński: 80-jara



Antaŭ 80 jaroj, la 1-an de novembro 1937, en Varsovio naskiĝis Roman Dobrzyński, televida ĵurnalisto kaj esperantisto, la plej konata aŭtoro de dokumentaj filmoj en kaj pri Esperanto. En *La Ondo de Esperanto*, nr-o 11/2017, skribis Roman Dobrzyński en "La romano pri Romano" sian biografion, pli ampleksan

ol en la baldaŭ aperonta leksikono "Nia Diligenta Kolegaro".

(*La Ondo de Esperanto*, nr-o 11/2017)

El Pollando al Hispanio

La nova podkastaĵo de Varsovia Vento *Elsendoj*, kun raportoj, intervjuoj kaj memoraĵoj aperis en la reto, en la adreso: <http://www.podkasto.net/2017/10/10/la-125a-elsendo/>.

Ĉina klasika libro Mozio havas Esperantan version

Mozio estas la nomo de ĉina filozofo, kiu naskiĝis en 470 a.K. kaj mortis en 371 a.K. Mozio estas ankaŭ la nomo de la libro, kiun Mozio kaj moziistoj skribis. La libro konsistas el 71 ĉapitroj. Danke al la Centro por Esplorado kaj Diskonigo pri Ĉina Kulturo de la Zao Huang-a Universitato la ĉina klasika libro Mozi kun 389 paĝoj estas lukse eldonita en ĉina lingvo kaj Esperanto de la Eldonejo Xueyuan. La libro estas esperantigita de profesoro Sasaki Teruhiro, eskprezidanto de KAEM. La eldono de la libro estas la unuan fojon por Esperantujo, kontribuas al la Esperanta kulturo kaj havas grandan signifon por diskonigo de la ĉina kulturo al la mondo. En oktobro 2017, la profesoro Li Dong, prezidanto de la universitato, donacis la libron al s-ino Zhang Weihong, direktoro de la Shandong-a Federacio de Socisciencaj Rondoj kaj profesoro Sasaki donacis la librojn al esploristoj pri ĉina kulturo Ma Shiyuan, prezidanto de Akademio de Konfuceo en Qufu-a Instruista Universitato kaj Sun Junheng, fakulo pri Mozi.

(<http://esperanto.china.org.cn/>, *Semio*)

(Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher)



Medienecho

Ich bedanke mich herzlich für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam-Ordner landen.

Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, werden in dieser Zusammenstellung nicht berücksichtigt.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die mir aber selber vorliegen, wird hingewiesen. Diese sende ich Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zu. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

14. Januar 2018

Medienanstalt Mecklenburg-Vorpommern

Esperanto-Welle, einstündige Sendung

<https://mmv-mediathek.de/play/23863-esperanto-welle.html>

9. Januar 2018

Profil

Esperanto: Was wurde aus der völkerverbindenden Kunstsprache?

Vor 130 Jahren wurde Esperanto erfunden. Die Kunstsprache sollte Völker verbinden und Grenzen überwinden. Wie finden Menschen in einer Welt, in der babylonische Sprachverwirrung herrscht, zueinander? Es gibt weltweit 7000 natürliche Sprachen plus zahllose Dialekte. Dazu kommen rund 1000 Kunstsprachen.

... Den vorläufigen Schlusspunkt unter die Bemühungen, Esperanto als Universalsprache zu etablieren, setzte Kurt Waldheim. Der Generalsekretär der Vereinten Nationen schmetterte 1978 den Vorschlag ab, Esperanto zur alleinigen UN-Sprache zu machen. China, das Esperanto traditionell fördert, legte deshalb sein Veto gegen eine dritte Amtszeit Waldheims ein.

Ein umfangreicher, lesenswerter und diskutierenswerter Artikel über Esperanto, der die üblichen Klischees erfreulich beiseite lässt:

<https://www.profil.at/gesellschaft/esperanto-kunstsprache-8612545>

2. Januar 2018

SR2 – Kulturradio

Ĉu vi parolas Esperanton? Sprechen Sie Esperanto?

Ein Interview mit Louis Wunsch-Rolshoven vom Verein "EsperantoLand"

Esperanto ist wohl die bekannteste und am weitesten verbreitete Kunstsprache für menschliche Kommunikation. In Saarbrücken findet derzeit das 16. Internationale

Neujahrstreffen des Vereins "EsperantoLand" statt. Im SR 2-Interview erklärt deren Vorsitzender Louis Wunsch-Rolshoven u. a., wie man die Sprache lernen kann und warum in China Esperanto besonders gefördert wird.

http://www.sr.de/sr/sr2/themen/panorama/20180102_interview_wunsch-rolshoven_esperanto100.html

2. Januar 2018

Halterner Zeitung

Esperanto ist mehr als nur eine Plansprache.

Andreas Diemel hat vor 17 Jahren Esperanto gelernt. Damals war er 18 Jahre alt. Dass Esperanto eine reine Plan- oder auch Kunstsprache ist, stört den heute 35-Jährigen nicht. Denn Esperanto hat ihm viele Kontakte ermöglicht, Freunde beschert und Türen und Tore geöffnet. Silvester hat der Duisburger diesmal in Haltern gefeiert. Zusammen mit rund 50 weiteren Esperanto sprechenden Menschen, die sich im Könzgenhaus zum Silvestertreffen versammelt hatten. Andreas Diemel hat es organisiert.

<https://www.halternerzeitung.de/Staedte/Haltern/Esperanto-ist-mehr-als-nur-eine-Plansprache-1241913.html>

<https://www.dorstenerzeitung.de/Staedte/Haltern/Esperanto-ist-mehr-als-nur-eine-Plansprache-1241913.html>

28. Dezember 2017

Saarbrücker Zeitung

"Es wäre vieles sehr viel einfacher."

Der Vorsitzende des Esperanto-Bundes wirbt in der Saarbrücker Jugendherberge für die Vorzüge der Sprache.

https://www.saarbruecker-zeitung.de/saarland/saarland/es-waere-vieles-sehr-viel-einfacher_aid-6991641

16. Dezember 2017

Braunschweiger Zeitung

Eine Sprache, die weltweit verbindet

"Über Esperanto habe ich immer sehr offene Menschen kennengelernt."

Wilfried Hinrichs mag die Verbundenheit der Esperantisten. Nach Helsinki und Berlin wollte ein japanisches Ehepaar die Esperanto-Stadt kennenlernen.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: "medienecho@esperanto.de", Betreff: "2017_12_06_braunschw_zeitung"

<https://www.braunschweiger-zeitung.de/braunschweig/article212863681/Esperanto-eine-Sprache-die-weltweit-verbindet.html>

gefunden am 16. Dezember 2017

Jesuiten

Esperanto: Der Pontifex der Sprachen

Esperanto ist der Brückenbauer unter den Sprachen, sagt Peter Knauer SJ, Esperanto-Spezialist der Jesuiten. Am 15. Dezember 1859 starb der Erfinder von Esperanto Ludwik Lejzer Zamenhof, jüdische Arzt und Hobby-Linguist. Aus diesem Grund feiern Sprecher weltweit an diesem Tag den Esperantobuchtag.

"Ich finde diese Sprache faszinierend, weil sie so unglaublich flexibel ist und man Dinge sehr genau ausdrücken kann. Sie ist im Vergleich zum Deutschen sehr korrekt." Knauer feiert in Brüssel sogar viermal im Jahr eine Messe in Esperanto, bei der jedes Mal eine feste Gemeinde dabei ist.

<https://www.jesuiten.org/slides-startseite/esperanto.html>

15. Dezember 2017

Neue Züricher Zeitung

Sprachlos

Piktogramme schaffen Klarheit ohne Worte.

... Zwar hat der Warschauer Augenarzt Ludwig Zamenhof 1887 das Esperanto erfunden, doch besser als diese künstliche Weltsprache können Bildsymbole Sprachbarrieren überbrücken, zumindest wenn es um kurze Hinweise, Informationen und Orientierungshilfen geht. Als Erster hat im damals vielsprachigen Österreich-Ungarn der Ingenieur Charles K. Bliss während des Ersten Weltkrieges solche Bildsymbole entwickelt.

<https://www.nzz.ch/archiv/archivtrouvailles/sprachlos-id.1338400>

14. Dezember 2017

Westfalenpost

Esperantotag im Zeichen Südkoreas

Interessierte Sprachbegeisterte begrüßte Inge Bartling zum Esperanto-Tag. Was eine Reise nach Südkorea und ein Akkordeon damit zu tun haben.

Zu einem besonderen Treffen hatte Inge Bartling aus Belecke, aus der Esperanto-Gruppe Warstein, Esperantisten aus Nah und Fern eingeladen.

<https://www.wp.de/staedte/warstein-und-umland/esperanto-tag-im-zeichen-suedkoreas-id212845915.html>

WAZ

<https://www.waz.de/staedte/warstein-und-umland/esperanto-tag-im-zeichen-suedkoreas-id212845915.html>

11. Dezember 2017

Dresdner neueste Nachrichten

Esperanto-Zentrum lädt zu literarisch-musikalischem Treff

Vor 100 Jahren starb der Schöpfer der Plansprache Esperanto, Ludwig Zamenhof. Zu dessen Ehren lud das Esperanto-Zentrum "Marie Hankel" zum literarisch-musikalischem Abend.

<http://www.dnn.de/Nachrichten/Kultur/Regional/Esperanto-Zentrum-laedt-zu-literarisch-musikalischem-Treff>

4. Dezember 2017

Süddeutsche Zeitung

Und Ötzi ruft "Trutg!"

Linguisten sind für Kinofilme und Computerspiele so wichtig wie einst Komponisten. Und sie rechnen sich. Über Esperanto - Klingonisch, Sindarin, Quenya & Co. <http://www.sueddeutsche.de/politik/linguistik-und-oetzi-ruft-trutg-1.3775930>

4. Dezember 2017

Harzkurier

Gäste aus Japan besuchen Esperanto-Centro

Nach Helsinki und Berlin wollte ein japanisches Ehepaar die Esperanto-Stadt kennenlernen.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netpost zu: "medienecho@esperanto.de", Betreff: "2017_12_04_harzkurier"

2. Dezember 2017

Stadt Wien

Ludwig Zamenhof – Schöpfer des Esperanto. Zum 100. Todestag

... Sein Werk ist von unschätzbarem Wert: Er hinterlässt die erfolgreichste Kunstsprache aller Zeiten – Esperanto. (Die Veranstaltung hat schon stattgefunden!)

https://www.wien.gv.at/vadb/internet/AdvPrSrv.asp?Layout=VAErgebnis_neu&Type=K&ID=452568&return=

2. Dezember 2017

Israelische Kulturgemeinde Wien

Ludwig Zamenhof – Schöpfer des Esperanto. Zum 100. Todestag

Es ist bereits zur Tradition geworden, dass das Polnische Institut in Zusammenarbeit mit dem Österreichischen Esperanto-Verband (ÖEV) den Geburtstag von Zamenhof begeht, der am 15. Dezember 1859 zur Welt kam. Dieses Jahr steht die Zamenhof-Feier unter einem besonderen Jubiläumsaspekt. Das Jahr 2017 wurde nämlich von der UNESCO zum Zamenhof-Jahr erklärt. (Diese Veranstaltung hat bereits stattgefunden!)

<https://www.ikg-wien.at/event/ludwig-zamenhof-schoepfer-des-esperanto-zum-100-todestag/>

29. November 2017

Focus online

Tanzworkshop "Hejmo"

Mit einer kurzen Erklärung zur Herkunft des Wortes "Hejmo" und ein paar Zeilen über Esperanto

https://www.focus.de/regional/nordrhein-westfalen/unna-tanzworkshop-hejmo_id_7914970.html

25. November 2017

KiKa

Eine Sprache für alle

Auf der Welt gibt es rund 6.000 Sprachen. Und dazu kommen noch mehrere tausende Dialekte. Wie soll man da den Überblick behalten und sich vor allem problemlos verstehen? Die Lösung: Eine Sprache für alle. Damit wäre auch die Kommunikation mit Personen leichter, die eine andere Sprache sprechen.

<https://www.kika.de/erde-an-zukunft/sendungen/sendung103948.html>

23. November 2017

Berliner Woche

Esperanto lernen beim Joggen: Neuer Max-Josef-Metzger-Platz bekommt modernes Infosystem

<http://www.berliner-woche.de/wedding/bauen/esperanto-lernen-beim-joggen-neuer-max-josef-metzger-platz-bekommt-modernes-infosystem-d137856.html>

23. November 2017

SÜDWEST PRESSE

Aus einem Gespräch mit Michael Degen:

Der jüdische Humor gilt als einzigartig. Kennen Sie einen guten jüdischen Witz?

Da muss ich kurz nachdenken – aber ja: Zwei Juden unterhalten sich und der eine fragt: “Sprechen Sie Esperanto?” Worauf der andere sagt: “Was heißt sprechen? Ich war drei Jahre drüben.”

Den finde ich immer wieder gut.

Das ganze Interview ist zu finden unter

http://www.swp.de/ulm/nachrichten/vermishtes/michael-degen-im-interview_-_bin-ziemlich-religioes-erzogen-words_-_24146097.html

gefunden am 18. November 2017

IKEF - Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

Die Internationale Fachgruppe für Handel und Wirtschaft (IKEF) hat im Sinne ihrer Verfassung das Ziel, das Wissen und die Verwendung der internationalen Sprache Esperanto in den Bereichen Handel, Wirtschaft und Wirtschaftswissenschaften zu erweitern.

<https://www.ikef-esperanto.net/deutsche>

16. November 2017

Neue Züricher Zeitung

Zwischen den Fronten

Von einem Zwergstaat zu sprechen, wäre übertrieben: Nicht einmal vier Quadratkilometer umfasst das Gebiet namens Neutral-Moresnet, das seine Entstehung dem Wiener Kongress von 1815 verdankt. Weil weder die Preussen noch die Niederländer auf die dortige Zinkgrube verzichten wollten, bildete sich diese völkerrechtliche Kuriosität in Form eines schmalen Kuchenstücks aus, die bis 1919 Bestand hatte – mit merkwürdiger politischer Verwaltung und napoleonischen Gesetzen, ohne Wahlen, ohne eigene Währung, Schul- oder Wehrpflicht.

<https://www.nzz.ch/fuilleton/zwischen-den-fronten-ld.1329027>

8. November 2017

Harzkurier

Esperanto-Kursleiter besuchen Seminar in Herzberg

Herzberg Der Lehrgang war Teil eines Projektes im Rahmen des europäischen Weiterbildungsprogramm “Erasmus plus”.

Seit Sommer 2016 gibt es über einen polnischen Bildungsträger für Esperanto ein zweijähriges europäisches Weiterbildungsprogramm “Erasmus plus” für künftige Esperanto-Kursleiter und Aktive in dieser neutralen Sprache.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: “medienecho@esperanto.de”, Betreff: “2017_11_09_harzkurier”

<https://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article212478583/Esperanto-Kursleiter-besuchen-Seminar-in-Herzberg.html>

4. November 2017

Harzkurier

Internationale Aufmerksamkeit für Herzberg

Der Deutsche Esperantobund tagte in Herzberg. Es wurde über das Medienecho im Unesco-Zamenhof-Jahr berichtet.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: “medienecho@esperanto.de”, Betreff: “2017_11_04_harzkurier”

14. Juli 2017

Forum – das Wochenmagazin

Eine Sprache wie ein Spiel

130 Jahren erfand der polnische Augenarzt Ludwig Lejzer Zamenhof eine neue Sprache: Esperanto. Sie sollte einfach und für jeden schnell zu erlernen sein. Zamenhofs Ziel war mehr Völkerverständigung. Bis heute hilft die Plansprache dabei, dass Menschen aus aller Welt miteinander kommunizieren können.

<https://magazin-forum.de/de/news/kultur/eine-sprache-wie-ein-spiel>

Julio 2018 en Grezijono

De la 21-a ĝis la 27-a de julio 2018: Esperanto en Artoj; Kulturdomo de Esperanto, Francio.

La 30-a Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) laŭ la temo *Esperanto en Artoj* okazos samloke kaj samtempe kun aranĝoj de la Kulturdomo de Esperanto en la kastelo Grezijono. Prelegoj ... muzikado... ekskursoj en la vizitindan pejzaĝon... atribuo de la OSIEK-premio. Ĉiujn informojn kaj la formularon de la aliĝilo vi trovos sur la paĝaro de Grezijono <http://gresillon.org/spip.php?rubrique30&lang=eo> aŭ eniru tra www.osiek.org/liek



Haushaltsplan 2018 der DEJ

Liebe Mitglieder,

in der letzten Ausgabe hat der DEB seinen Haushaltsplan vorgestellt, jetzt zieht die DEJ nach. Der Haushaltsplan enthält nur die sicheren Einnahmen, aber alle bereits vorhersehbaren Ausgaben – auch die unsicheren. Bereiche, die unsichere Einnahmen haben, oder die sich nach unserer Planung selbst tragen sollen, sind mit 0€ eingetragen.

Die diesjährige Bilanz sieht insgesamt negativ aus; dies liegt daran, dass die Einnahmen des JES 17/18 und des Projekts „Genra Egaleco“ bereits ins vorherige Jahr gefallen sind. Wir erwarten für diese Bereiche insgesamt eine ausgeglichene bis leicht positive Bilanz. Kore salutas

Lars Hansen – kasisto –
Lars.Hansen@esperanto.de

Name	Einnahmen
Einnahmen (Summe)	12800
Spenden	0
Mitgliedsbeiträge	1600
Fördergelder (allgemein)	0
Projektsubventionen	11200
Rückzahlungen IJK 2015 Wiesbaden	0
Zinserträge	0
Ausgaben (Summe)	-54200
Treffen (Summe)	-12400
JES 2017/18	-12000
KEKSO 23	-200
KEKSO 24	-100
JES 2018/19	0
Esperanto-Kurse	-100
Geschäftskosten (Summe)	-1800
Verwaltung	-1000
Versicherung	-250
Bankkosten	-250
Vorstandskosten	-250
sonstiges	-50
Fahrtkostensubventionen	0
Projektausgaben	-40000
Gesamt	-41400

Protokoll zur Jahreshauptversammlung der Deutschen Esperanto-Jugend (DEJ) e.V.

